

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

116-a jaro • n-ro 1381 (7-8) | julio-aŭgusto 2023

Biblioteko Hector Hodler trovis novan hejmon | 147

Estrara Raporto pri la agado de UEA en 2022 | 157



Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908
de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon,
la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo
Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran
bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la
evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ševčenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek
Kovrilpaĝaj fotoj: Biblioteka Narodowa.

Artikoloj de privatuloj ne reprezentas oficialan sintenon
de UEA. La aŭtoroj respondecas pri siaj artikoloj
enhave kaj lingve.

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto, Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044

<https://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 5,00.
Generala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifo (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.

Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncetoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas
minimume €20,00). Mendu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam

Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,

BIC/SWIFT: INGBNL2A

(Universala Esperanto-Asocio en

Rotterdam, Nederlando)

PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ

Rotterdam, Nederlando.

tel.: +31-10-436-1044

uea@co.uea.org www.uea.org

Enhavo



147

Biblioteko Hector Hodler trovis novan hejmon

La 29-an de majo 2023, en la sidejo de la pola Nacia Biblioteko okazis ceremonio, kiu oficiale stampis la transdonon de la kolekto de Biblioteko Hector Hodler el Roterdamo al Varsovio.



150

Helga Ploetner – pentristino el Germanio

En 2020 aperis la unua libro Esperanto por mi el la eldonejo Horizonte, Japanio, kun ŝiaj desegnaĵoj de la portretoj de aktivaj esperantistoj el diversaj landoj. Nun aperos la sesa.



152

Libera artisto

La monumento al L. Zamenhof, kreita de li, longe restis la sola sur la teritorio de Sovetunio. Ĝi staras ĝis nun en tipe odesa korteto.



157

Estrara Raporto pri la agado de UEA en 2022

En ĉi tiu Estrara raporto pri la agado de UEA en la jaro 2022, vi konstatos kiom antaŭeniris niaj planoj por la estonteco kaj kio estas jam atingita.

AMO 151

AMO-seminarioj en la centa jubileo kaj poste

Evento 155

PEKO – Printempa Esperanto-Kunveno. 18 – 21 majo 2023

UEA 156

Aliroj al strategia laborplano: resume kun detalo pri la kvara

Oficiala Informilo

Spezokonto 164

Fake, Science kaj Profesie tra la mondo 166

Scienca agado en la Germanaj E-Kongresoj kaj la 50-a BEL-a jubileo Aperis libroforma GEA-kongresa dokumento pri daŭripovo subvenciita de Erasmus+

Evento 167

Inter kubaj montetoj kaj valoj: Krisolaj Esperanto-Tagoj 2023

Afriko brilas

Brilanta Esperanta Afriko

de Universala Esperanto-Asocio

Estraro

Prezidanto: D-ro Duncan Charters (Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro kaj Dokumentado)
PO Box 100, Elsalh, IL 62028-0100, Usono
Tel. +1 618 374-2453
uea.prezidanto@aol.com

Vicprezidanto: S-ro Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr. (Centra Oficejo, Financoj, Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko)
R. Andrade Pertence 42/503 Rio de Janeiro RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

Vicprezidanto: D-ro Amri Wandel (Scienca kaj Faka Agado, Revuo Esperanto, Terminologio, Meza Oriento kaj Norda Afriko)
767 Makabim, 7179901 Modiin, Israelo
Tel. +972-54-454-8712
amriwandel@gmail.com

Ĝenerala Sekretario: S-ro Aleks Kadar (Administrado, Delegita Reta, Rilatoj kun Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj kun TEJO, Statuta Reformo)
197 rue de Lourmel
FR-75015 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

Membro: S-ino Aurora Bute (Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo)
Str. Brândușei nr. 6, Sc. C, ap.1
RO-300626 Timișoara, Rumanio
Poŝtel. +40 758 899 289
aura.bute@gmail.com

Membro: D-ro François Lo Jacomo (Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de Esperanto, Esperanto-Centroj, Gemelaj Urboj)
72 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 80 88 53 27
francois@lojacomo.eu

Membro: S-ro Jérémie Sabiyumva (Aktivula Maturigo, Afriko)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

Membro: D-ro So Jinsu (Eldonado, Azio kaj Oceanio)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Hangang Bamsom Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

Observantoj de TEJO:
S-ro Albert Stalin Tancinco Garrido kaj S-ro Tyrone Surmon

Observanto de ILEI:
Ing. Ahmad Reza Mamduhi

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>

Biblioteko Hector Hodler trovis novan hejmon

■ Tobiasz Kubisiowski

London, la 29-an de majo 2023, en la sidejo de la pola Nacia Biblioteko okazis ceremonio, kiu oficiale stampis la transdonon de la kolekto de Biblioteko Hector Hodler el Roterdamo al Varsovio. La eventon gvidis la direktoro de la Nacia Biblioteko, Tomasz Makowski, kune kun Duncan Charters, la prezidanto de UEA. Unu el la invititaj gastoj estis Piotr Gliński, vicĉefministro kaj ministro pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo de Pollando. La ceremonio sekvis mallonga scienca simpozio, kiu pritraktis la gravecon de Esperantaj bibliotekaj kolektoj el la vidpunkto de diversaj scienckampoj.

“Ekde hodiaŭ la Nacia Biblioteko fariĝas centro de Esperanto-dokumentado”, konstatis Piotr Gliński, pola vicĉefministro kaj ministro pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo, kadre de sia alparolo dum la ceremonio. Efektive, la ceremonio kronis plursemajnan procezon de transportado de unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj, kun dekoj da miloj da libroj, revuoj, fotoj kaj diskoj, sume pli ol sep tunojn pezaj, el Roterdamo al Varsovio. La kolekto estis komencita en 1908 en Ĝenevo, aĉetita de Hector Hodler en 1912 kaj transdonita al la asocio de lia vidvino post lia morto. En 1936 UEA jam provis transdoni sian kolekton al profesiaj bibliotekoj, ĉu al Vieno, ĉu al la Vadiana en St.Gallen, sed la projekto tiam fiaskis. La ĵusa translokado ne estas la unua en la historio de la biblioteko, sed ekde nun por la unua fojo ĝi iĝas protektata de ŝtata instanco, danke al kio ĝi povos esti profesie katalogita kaj parte ankaŭ ciferecigita.



Unu el la montrofenestroj en la ekspozicio aranĝita de la Nacia Biblioteko (foto Biblioteka Narodowa)

Dum la ceremonio, kiu okazis en tri lingvoj (la pola, Esperanto kaj la angla), Tomasz Makowski, Piotr Gliński kaj Duncan Charters plurfoje substrexis la unikecon de la kolekto de Biblioteko Hector Hodler (BHH) ne nur por la Esperanta, sed ankaŭ por la monda kulturo. Kiel anoncis la direktoro de la Nacia Biblioteko, la sekva paŝo estas proponi BHH por la Unesko-listo de monda heredaĵo. Rimarkindas, ke ekde 2014 Esperanto mem, kiel portilo de la Esperanta kulturo, troviĝas sur la pola Unesko-listo de nemateria kultura heredaĵo.

Post la paroladoj okazis oficiala subskribo de la kontrakto inter UEA kaj la Nacia Biblioteko pri la transdono de BHH al Varsovio.

La eventon akompanis ekspozicio en la antaŭ nelonge renovigitaj salonoj de la Nacia Biblioteko. La vizitantoj povis rigardi kelkajn interesajn speci-

menojn de la transdonata kolekto, interalie diskojn, kalendarojn, revuojn kaj aliajn Esperanto-varojn.

Post la ĉefa parto de la ceremonio (kaj mallonga kafopaŭzo) sekvis interfaka simpozio pri Esperanto-bibliotekoj kaj ilia signifo en la sciencaj esploroj. La simpozion gvidis Pascal Dubourg Glatigny kaj Gabriela Skonieczna, kiu ekoficas kiel la kuratoro de la kolekto kadre de la Nacia Biblioteko. Ĝi enhavis kvar prezentojn, du en la pola lingvo kaj du en la angla, fare de kvar sciencistoj de diversaj fakoj, kiuj en sia laboro okupiĝas interalie pri Esperanto. La publiko disponis je resumo de ĉiuj kvar prelegoj en ĉiuj tri lingvoj de la evento.

La unua el la kvar prezentoj estis farita de Pascal Dubourg Glatigny, historiisto kaj esplordirektoro en Nacia Centro pri Scienca Esplorado (CNRS)



Tomasz Makowski, direktoro de la Nacia Biblioteko kaj Duncan Charters, prezidanto de UEA, subskribas la kontrakton (foto F. Lo Jacomo)



La podio de la seminario post la ceremonio (foto P. Z. Kowalski)

en Parizo. Lia anglalingva prelego, titolita “La defio konservi transnacion heredaĵon: la futuro de kolekto Hodler”, prezentis skize la historion de Biblioteko Hector Hodler kaj de la arkivo de UEA. Krome, ĝi resumis kelkajn aspektojn, kiuj montriĝas aparte defiaj en la konservado kaj kompletigado de Esperantaj librokolektoj. Fine la prezentanto montris, kiel la fakto, ke ekde nun BHH eniros la strukturojn de profesie mastrumata kaj ŝtate financata biblioteko, povas pozitive influi la kolekton mem kaj ĝian alireblecon.

Sekvis pollingva prezento de Ida Stria, lingvisto kaj esperantologo el la Universitato de Varsovio, pri “Havebleco de Esperantaj bibliotekaj kolektoj el lingvistika perspektivo”. En sia prelego, ŝi unue preparolis la lingvon Esperanto mem kiel planlingvon kaj alternativan lingvafrankaon. Ŝi montris, kiel nuntempaj lingvistikaj esploroj analizas la lingvon kaj ĝian uzon kaj montras, ke ĝi havas ne nur sian originan komunikan celon, sed ankaŭ integran kaj identecan funkcion. La prezentan-

to ankaŭ demonstris, kian rolon havas fontoj, precipe ciferecigitaj fontoj sub la formo de korpusoj, en ŝiaj propraj lingvistikaj esploroj. La prelego enhavis ankaŭ kelkajn rimarkojn pri instruado de Esperanto kaj esperantologio en la universitata kadro.

La tria prezento de la simpozio estis tiu de Denis Eckert, doktoro pri geografio en la pariza esplorcetro Géographie-cités kaj la berlina Centre Marc Bloch. Lia prelego estis prezentita en la angla kaj havis la titolon “Varsovio kiel deirpunkto por la disvastigo de «lingvo internacia»: la unuaj Esperantaj lernolibroj kaj vortaroj kaj iliaj aŭtoroj (1887–1890)”. Ĝi temis pri geografia superrigardo de la disvastiĝo de la unuaj lernolibroj de Esperanto, precipe de la diverslingvaj eldonoj de la Unua Libro, en Eŭropo fine de la 19-a jarcento. Ĝi ankaŭ prezentis skize la aŭtorojn de la lernolibroj publikigitaj en tiu tempo. La prelegon konkludis kelkaj rimarkoj pri la utilo de Esperanto-bibliotekoj por retrovi la plej fruajn librojn en kaj pri Esperanto kaj iliajn unuajn eldonojn.

La prelegan parton de la simpozio finis prezento de Marek Nahajowski, muzikteoriisto el la Muzika Akademio en Lodzo, kiu parolis pri “Esperanto kaj muziksciencoj – la nuna stato kaj perspektivoj por plua disvolviĝo”. Li komencis per kelkaj rimarkoj pri la specifaj trajtoj de sciencoj kiel muzikteorio kaj muzikologio, kiuj devas uzi pli literaturan lingvaĵon kaj kiujn tial pli rekte koncernas la demando pri la lingvo de sciencaj esploroj kaj pri tradukado de la sciencaj tekstoj. Nahajowski montris ankaŭ, kiel la disponeblo kaj alireblo de diverslingvaj fontoj gravas por la disvolviĝo de la muzikaj sciencoj en apartaj lingvaj komunumoj. En la dua parto de la prelego, la prezentanto parolis pri la graveco de Esperantaj librokolektoj, precipe de BHH, en la esploroj pri la rilatoj inter Esperanto kaj muziko kaj la muzika kulturo de la esperantlingva komunumo.

La trihoran programon de la evento finis mallonga sesio de demandoj kaj respondoj. Kadre de ĝi, la kvar prelegantoj havis la okazon preparoli interalie la defiojn en starigado de esperantlingvaj kursoj en la kadro de ŝtataj universitatoj kaj la demandon pri la publiko de fakaj tekstoj en Esperanto.

La ceremonio estis sendube grava simbola momento por ĉiuj esploristoj, kiuj uzas Esperantajn fontojn en sia laboro, sed ankaŭ por la tutmonda komunumo de Esperanto-parolantoj, ĉar la transdono de la kolekto de BHH donas novan ŝancon por detala katalogado kaj vasta disponebligo de la provizoj. Ni esperu, ke la jaro 2023 estos la komenco de nova ekfloro de la biblioteko kaj digna daŭrigo de ĝia longa tradicio.

Post la ceremonio, inter la amaskomunikiloj kiuj reprezentigis estis polaj televidaj servoj. Ili intervjuis la vicĉefministron, kiu tre favore klarigis la meritojn de Esperanto al la spektantaro, la direktoron de la Biblioteko, kiu simile pozitive parolis pri la valoro de la akiraĵo, kaj por la internacia anglalingva servo de pola televido la prezidanton de UEA. Ĉiuj donis favoran impreson al la spektantoj, ĉar la intervjuistoj interesiĝis senkritike pri diskonigo de la ceremonio kaj bazaj faktoj pri la nuna uzo de Esperanto kaj lasis la intervjuatojn tion klarigi. Pro tio multaj poloj kaj alilandanoj estas nun pli bone informitaj pri nia lingvo.

Efika kaj profesia transdono

Fine de 2022, post kelksemajna intertraktado gvidata de advokato Piotr Karcz, membro de la financa komisiono de UEA, la asocio atingis interkonsenton kun la pola Nacia Biblioteko. Dank' al la intensa laboro de Julia Konopka-Żońciewicz, vic-direktorino de la Nacia Biblioteko, la diversaj etapoj de transporto de la materialo al Varsovio efektiviĝis rapide kaj sekure. La kolekto entenas ne nur librojn kaj periodaĵojn, sed ankaŭ afiŝojn, flugfoliojn, instrumaterialon, bildojn, manskribaĵojn, sondokumentojn, filmojn kaj aliajn objektojn, kiuj rilatas al la historio de Esperanto.

En la nuna momento la materialo estas sekigita, senpolvigita kaj pritraktata kontraŭ fungoj kaj acida damaĝo. La

katalogado jam komenciĝis. La nacia biblioteko dungis Esperanto-parolantan prizorganton, Gabriela Skonieczna, kiu ankaŭ rilatos kun la Esperanto-komunumo por la plukresko de la kolekto kaj alvokas por pluaj donacoj. Venonte la tuta kolekto estos senpage konsultebla por ĉiuj legantoj en la malfermaj horoj de la Nacia Biblioteko de lundo ĝis sabato 08:30 – 20:30.

Dank' al la kontraktoj kun la Aŭstra Nacia Biblioteko kaj Pola Nacia Biblioteko, UEA fine povas profesie disponigi al la membraro de UEA, al aliaj esplorantoj kaj al la ĝenerala publiko ne nur la ĉefajn, sed ankaŭ la nekonatajn verkojn en kaj pri la internacia lingvo.

Esperanto moviĝas en Varsovio

Antaŭ kelkaj monatoj malfermiĝis en la plena centro de Varsovio la gejamika restoracio Butero, kiu portas Esperantan nomon honore al la tradicio de toleremo kaj interkompreno de la Esperanto-movado. Jam la loko famiĝis pro vizito antaŭ nelonge de la angla princo William.

Sed Varsovio estas ankoraŭ hodiaŭ grava centro de la Esperanto-agado. En la urbo aktivas du el la plej aŭskultataj podkasto en Esperanto, Pola Retradio (<https://pola-retradio.org/>) kaj Varsovia Vento (<https://www.podkasto.net/>), kies elsendoj estas gravaj por la disvastigo de Esperanta elparolo. Ankaŭ la redaktoro de la revuo *Kontakto* Paweł Fischer-Kotowski longe laboris kaj vivis en Varsovio. La retejo www.culture.pl regule aperigas artikolojn ligitajn al Esperanto:

ekzemple pri la rilato de la verkistino Julia Fiedorczuk al Esperanto, pri la tradukoj de Tomasz Chmielik al Esperanto aŭ pri tio «kiom da pola lingvo estas en Esperanto?» aŭ «ĉu David Bowie sciopovis Esperanton?». Kaj en Polin, la muzeo de la historio de



Esperantistoj festas la transdonon de la biblioteko ĉe la restoracio *Tel Aviv*

polaj judoj, oni prezentas de 2013 Zamenhof kaj la komencon de «lingvo internacia».

En Varsovio havas sian sidejon Pola Esperanto-Asoocio, kiu en lastaj jaroj reorganizas sian agadon kaj klopodas kunordigi individuajn iniciatojn. Kelkajn tagojn antaŭ la ceremonio organizita de la Nacia Biblioteko, PEA havis standon ĉe la scienca pikniko, kaj tie prezentis Esperanton al miloj da varsovianoj. Venu al Pollando kaj renkontu la lokajn esperantistojn! De la 20-a al la 23-a de julio 2023, PEA invitas al sia kongreso en la urbo Siedlce, oriente ne for de la ĉefurbo (<https://mallonge.net/10s>). Tie vi povos kunfesti la alvenon de la kolekto Hodler al Pollando, sed ankaŭ malkovri la trezorojn de la urbeto, interalie pentraĵojn de El Greco.



François Lo Jacomo, estrarano de UEA, ĉe la restoracio Butero en Varsovio



La filmoj en esperanto
de la

Laŭzana Esperanto-Societo

ĉeestas en jutubo - esperantolausanne



Helga Ploetner – pentristino el Germanio

■ Elena Popova

Kun Helga Ploetner mi neniam renkontiĝis, sed tio ne malpermesas nian amikecon rete. Nin proksimigis la Lingvo Esperanto. Bona kaj forta estas la spirito de mia amikino, malgraŭ la malfacilaĵoj en ŝia vivo.

Ŝi estis naskita en la fino de la Dua mondmilito kaj de tiam konas la malriĉecon kaj la bonecon de la homoj. Ŝi skribas, ke ŝi ĉiam laboras kun kredo, amo kaj espero por paco.

Ŝia tuta vivo estas ligita kun la pentroarto, kiel ŝi skribas, ekde kiam ŝi estis tri-jaraĝa. Poste ŝi studis inter 1974 kaj 1978 en la Speciala Distrikta Kulturakademio de Halle/Saale kaj de 1988/1989 – en la Akademio pri Arto en Dresdeno kaj en diversaj artkursoj. Kiel docento de Popolaltlernejo ŝi instruis arton al infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj. Ŝi pentris liberprofesia homojn, bestojn kaj la naturon ĝis 2016. «Mi instruas private en mia ateliero, ĉar mi estas nun handikapulino en elektra rulseĝo kun flegogrado tri. Mi finis kontaktojn pro la terura pandemio de kronviruso en 2020, tiun malsanon mi kaptis en januaro 2023». Ankaŭ ŝia edzo Manfred Reyher havas

sanajn problemojn, sed ili helpas unu la alian kun amo.

Ŝia patro ludis mandolinon en urba orkestro kaj ankaŭ ŝi ludis. Estis muzikaj horoj en ŝia domo. Ŝia patrino rakontis al ŝi pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj en 1980 ŝi eklernis la lingvon. Jam dum 43 jaroj ŝi laboras por la Esperanta ideo pri paco kaj amikeco inter la homoj. Ŝia filino Jana same estas esperantistino.

En 2020 aperis la unua libro *Esperanto por mi* el la eldonejo Horizonte, Japanio, kun ŝiaj desegnaĵoj de la portretoj de aktivaj esperantistoj el diversaj landoj. Nun aperos la sesa. La eldonisto kaj redaktoro de la libroj Hori Jasuo skribis: “Mi vere esperas, ke ŝiaj artaĵoj restos en Esperantujo kiel valoraj heredaĵoj...”

Pri tiu sia laboro Helga skribas:

“Mi portretas en la unua tago minimume 3 horojn, kaj poste mi korektas, aldonas aŭ forprenas, atentante eĉ hareton, kaj fortigas aŭ malfortigas lumojn kaj ombrojn. Mi portretas tiun homon laŭ la foto kun amo, kvazaŭ ŝi/li sidus antaŭ mi, kaj la horoj kaj tagoj forflugas nur por portreti unu kapon. Profesie mi portretis multajn homojn, sed mi plej ŝatas portreti esperantistojn, kiuj havas vere portretindan mienon kun homamo.” – skribis ŝi en la libro *Esperanto por mi*, n.1/2020. Ankoraŭ:

“Sciu, kiam mi desegnas, mi ne desegnas, mi karesas per la kraĵono, per nigra kreto... kaj mi prilaboras, karesas, multajn tagojn, multajn horojn, je nur unu portreto.... unu kapo...” – skribis ŝi en unu letero.

De 2020 ŝi pentris portretojn de 96 geesperantistoj kaj donacis ĝojon al ĉiuj, ankaŭ al mi. Malfacila laboro, kiun ŝi plenumas kun amo.


Granda kaj respondeca estas la kunlaboro de Helga Ploetner kaj Hori Jasuo, kiel pentristo kaj eldonisto, kaj mi deziras al ili sukcesojn! Tio estas ekzemplo kiel nia lingvo Esperanto donas eblecon al la homoj de diversaj landoj labori kune pri la ideo de amikeco kaj paco inter la homoj.



Mi estas fiera esti iniciatinto de la libroj de Helga

■ Hori Jasuo
(eldonejo Horizonte, Japanio)

Mi renkontis, aŭ pli ĝuste vidis Helga-n dum la kunsido de “Japana Konstitucio” en la UK en Lille en 2015. Japanaj pacamantoj organizis la kunsidon, sed la preparo ne estis bona. La partoprenantoj ne komprenis, pri kio temas, kaj mi, ne respondeculo pri la kunsido, ne povis sidi silente, kaj ekparolis antaŭ ili. Kaj kiam ni estis finiĝontaj la kunsidon, unu virino venis antaŭen, dirante “Nun estas tempo por agadi”, kaj ŝi komencis skribi sian nomon sur la granda subskriba formularo algluita sur la nigra tabulo, kaj sekvante ŝin, ĉiuj stariĝis kaj ekskribis sian nomon. Tiamaniere la kunsido finiĝis, kaj mi kaj la respondeculoj sta-




radis tie, mirante pri la okazaĵo. Tio estis la renkontiĝo kun Helga. Antaŭe mi neniam renkontis ŝin, do vidante ŝian subskribon, mi ekkonis ŝian nomon.

Jaroj pasis. Mi ne memoras, kiel niaj interŝanĝoj de retaj mesaĝoj komenciĝis, sed venadis al mi ŝiaj multaj kaj longaj mesaĝoj. Tio estis iom ĝena por mi, ĉar ŝi estis tre skribema. Tamen mi ne rifuzis ŝin kaj plu interŝanĝis mesaĝojn. Kaj iun tagon ŝi sendis al mi mian portreton, uzante mian foton ie aperintan. Ĝi estis tre bone farita, sed mi diris al ŝi, ke mi ne estas portretinda, do vi ne misuzu vian valoran tempon por mia portreto. Tamen ŝi plu sendis al mi portretojn de aliaj homoj, kaj iun tagon mi ekpensis eldoni libron konsistantan el ŝiaj portretoj de esperantistoj. Mi proponis tion kaj ŝi kun granda ĝojo akceptis la proponon, kaj nia kunlaboro komenciĝis.

Mi elektis 16 esperantistojn. Tio ne estis malfacila, ĉar mi konis multajn esperantistojn. Mi elektis 16 esperantistojn, 8 virinojn kaj 8 virojn, el diversaj landoj kaj kontinentoj. Mi intencis elekti esperantistojn ne tiel famajn sed diligente agadantajn loke. Mi donis al ĉiuj portretitoj po unu paĝon, kiu konsistas el la portreto, eseo kaj foto en ĉiutaga vivo. Ĉiuj havas tre riĉan vivon danke al Esperanto. Mi volis, ke la legantoj, precipe komencantoj, havu fidon pri Esperanto kaj kuraĝon al Esperanto.

Mi redaktis la tekston kun ĝojo. En la unua libro aperis Helga kaj mi. Mi sendis la tekston al la presejo. Mi devis pagi por la libro, do por ŝpari



monon, mi mendis ne-koloran libron, ĉar portretoj ne estas koloraj, sed la presisto erare presis en koloroj. Tiu eraro rezulte estis tre bona. Ja mi devis pagi iom pli, sed la libro fariĝis tre bela, kaj mi estis kontenta, kaj ankaŭ Helga estis kontenta.

Mi ne havis planon plu eldoni librojn, sed Helga volis plu portreti, kaj mi akceptis tion. Tiam, kaj ankaŭ nun, ŝi estis tre malsana, do mi timis, ke ŝi ne plu povos portreti post nelonge. Eble ankaŭ Helga tion antaŭvidis kaj haste desegnadis aliajn 16 esperantistojn, kaj la dua libro aperis nur 5 monatojn poste, en decembro 2020, kiel mia kristnaska donaco al ŝi. Helga plu portretis kaj portretis kaj jam aperis 5

libroj, kaj baldaŭ aperos la 6-a libro. Por la koloroj de la kovrilo, mi uzis ruĝon, verdon, bluan, oranĝon kaj lazuron. Kiun koloron ni uzu por la 6-a libro?

Kvanto pli valorigas ĉion. Se ni eldonus nur unu libron kun 16 esperantistoj, la libro kaj laboro de Helga malaperus en amaso da Esperanto-libroj, sed nun ni havas 6 librojn kun 96 esperantistoj nun aktivantaj. 96 esperantistoj! Nekredebla kvanto kaj nekredebla sindonemo de Helga. Mi estas tre fiera por tio, ke mi estas iniciatinto de tiu serio kaj pro tio, ke mi donis lumon al ŝia vivo. Mi vere deziras, ke Helga plu havu energion portreti. Mi restos ŝia sincera kunlaboranto eterne.

AMO

AMO-seminarioj en la centa jubileo kaj poste

■ Stefan MacGill

Ok jarojn post la lanĉo de la seminarioj en marto 2014, ni atingas la centan. Tri seminarioj okazos tra la kongresa sezono:

AMO 100: Hungario, Tiszafüred, la 20-an de junio kun la temo: "Esperanto aganta en la 21-a jarcento".

AMO 101: Latvio, Ventspils, julio, kadre de la 56-a BET, kun la temo: "Pli dinamika medio por baltaj esperantistoj."

AMO 102, Italio, aŭgusto: Lignano Sabbiadoro "Tradicio de la Kongresoj de ILEI".

Ĉiuj el tiuj seminarioj estos hibridaj. Ĉiuj havas aŭ havos lumbildajn prezentaĵojn, petebajn de Stefan MacGill. En aktiva preparo deflanke de la AMO-Komisiono, ni planas pliajn seminariojn ĝis la UK 2024 en Aruŝa, Tanzanio.



Libera artisto

■ Tatjana Auderskaja

La 20-an de majo, 1898 naskiĝis Nikolaj Vasiljeviĉ Blaĵkov; skulptisto, pedagogo, esperantisto.

Tiun homon memoras multaj. La monumento al L. Zamenhof, kreita de li, longe restis la sola sur la teritorio de Sovetunio. Ĝi staras ĝis nun en tipe odesa korteto ĉe la strato Deribasovskaja, la ĉefa strato de nia urbo.

Multaj esperantistoj scias pri ĝi; Hugo Röhlinger notis ĝin en sia libro *Monumente pri Esperanto*. Al Odeso ofte venadis gastoj, kaj ĉiam ni kune omaĝis la Majstron apud lia monumento.

En 1998 en Odessa okazis SAT-Kongreso; tiam nia junulara klubo renovigis la monumenton, deskrapante de ĝi kelkdekjarajn tavolojn da farbo kaj koto. Ni purigis ĝin ĝis la betona bazo; kaj tute hazarde nian laboron tie filmis germana televido.

La filmon oni vidis, krom Germanio, ankaŭ en Pollando kaj Francio; kaj en 2002 nia klubo mem kreis filmon

pri Odessa, kie honora loko estas disponigita al nia fama monumento.

Sed kiu kreis ĝin? Sur la piedestalo de la busto estas skribite: "Kreinto de Esperanto". Sed kion ni scias pri la kreinto de la monumento?

Starante antaŭ nia Kontraŭspion-arma Departemento (SMERŜ) en 1945, tiu persono al la demando pri

socia stato fiere respondis: "Libera artisto!".

Jes, sian tutan vivon li estis libera. Libera anime. Kaj tiun liberon, liberemon li scipovis transdoni al siaj lernantoj, al tiu junularo, infanaro, kiu ĉiam apudis lin. Libereco estis lia natura stato, kaj ni simple enspiris tiun aeron de libero, kaj tiel edukiĝis. Mi estis lia lernantino.

Nikolaj Vasiljeviĉ Blaĵkov naskiĝis la 20-an de majo 1898 en Odessa. Lia patro estis ŝtabs-kapitano de artilerio. En 1917 Nikolao finis gimnazian kurson kaj devis serĉi sian lokon en la vivo. Li eklaboris en popola muzeo... kiel gardisto. Tia estis lia unua proksima kontakto kun la arto. Poste li ekmastris la profesion de skulpta modlisto en porcelana fabriko, kaj daŭrigis lernadon de skulpta arto en la fama Stroganov-lernejo.

En 1920 li konatiĝis kun la doktrino de Lev Tolstoj, kiu kongruis kun lia pensmaniero, kaj dum la tuta vivo sekvis ĝiajn principojn. Dum juĝenketado en 1945 li diris: "Mi estas kontraŭ



plenpova ŝtata potenco kaj ajna perforto: arestoj, prizonoj, trudlaboroj; mi estas kontraŭ militservo, mi estas por suvereneco de popoloj, internacia kulturo kaj la internacia lingvo Esperanto. Mi estas kontraŭ ajna politika partio”.

Sekvante siajn principojn, Blaĵkov ne partoprenis la Civilan militon en RSFSR: li forkuris de mobilizo en la Blankan Armeon, sed militservon en la Ruĝa Armeo li evitis oficiale: la juĝejo permesis al li anstataŭigi ĝin per instruista laboro en vilaĝo.

En la 20-30-aj jaroj, post fino de la studado en Stroganovka, N. V. Blaĵkov partoprenis artajn ekspoziciojn kiel skulptisto. En tiuj jaroj komenciĝis ankaŭ lia lernado de Esperanto, kiu ĝis la lasta momento estis, samgrave kiel skulptarto, la ĉefa afero de lia vivo.

En junio 1941 li estis mobilizita al la Ruĝa Armeo por defendi nian Patrujon de nazioj. La principoj de neperforto de Tolstoj ne malhelpis al li partopreni en tiu justa batalo. Tamen li ne mortigis homojn. Blaĵkov servis kiel topografo en la stabo de la 9-a populararmea divizio je la nomo de S. M. Kirov.

La 12-an de oktobro 1941 la staba aŭto estis pribombita; la transvivintaj stabanoj sin kaŝis en arbaro, sed estis kaptitaj de malamikoj. Komenciĝis suferoj de Blaĵkov en koncentrejoj por militkaptitoj.

En la koncentrejo Blaĵkov organizis ceramikan metiejon, kie li instruis modladon al la militkaptitoj, savante ilin tiamaniere de pezega trudlaboro. El argilo, el ligno li faris portretojn de samsortanoj. Pri la ceramikisto kaj skulptisto el la koncentrejo eksciis la posedanto de



S. Rublov



Inaŭguro de la monumento

la ceramikejo, la pentristo Vitold Braĝis el la litova urbo Alitus, kie troviĝis la koncentrejo. Li petis la estraron lasi la bonan skulptiston labori en lia metiejo.

Ĝis la fino de sia vivo memoris N. V. tiun litovon, kiu ebligis al li spiri relative libere en tiu terura tempo. Sed la estraro priatentis Blaĵkov, kaj post juĝesploro transigis lin al koncentrejo en Kaunas kun pli severaj kondiĉoj. Tie Blaĵkov restis ĝis majo 1944, kiam lin denove arestis la gestapo. Tio okazis la 20-an de majo 1944, ĝuste en lia naskiĝtago. Unu monaton li pasigis en gestapaj karceroj, kaj fine de junio estis sendita al la organizaĵo “VENETA”. Ĝi troviĝis en la kastelo Jablonovo, kie estis kolektitaj kleruloj kaj artistoj el la okupitaj regionoj de USSR. Tie N. V. devis ĉizi el ligno kapojn por pupoj, destinitaj por infanoj de “ostarbajter”, kaptitaj popoloj, kiuj sklave laboris ĉe germanaj mastroj.

Kiam al Jablonovo venis Soveta Armeo, N. Blaĵkov memstare venis al soveta militkomandanto de la urbo. La kontraŭspiona armea departemento prienkotis lin. Liaj literaturaj verkoj, portretoj, desegnaĵoj altiris la atenton... kaj rezulte aperis la akuzo pri “perfido de la patrujo” (art. 58-1 “a” de la Kriminala kodekso de RSFSR). En juĝkunsido de la milita tribunalo, kiu okazis sen atestantoj, sen advokato kaj prokuroro, la juĝato Blaĵkov respondis al la demandoj de la Tribunalo (laŭ la arkiva juĝesplora dosiero N 24607, la

Fondaĵo de ĉesigitaj dosieroj, la Arkivo de SBU en la Odesa provinco). Jen la citaĵo:

“Mi ne opinias la sovetan ŝtatordon ideala. Forestas libero de vortoj, libero de preso. Dum mia militkaptiteco mi parolis kun multaj kaptitoj, kaj eksciis, ke multaj el ili estis tute senkiale enprizonigitaj en Sovetunio. Mi ne opinias ideala ankaŭ la germanan ŝtatordon. Mi opinias ideala tian ordon, kie forestas prizonoj, perforto, militoj”. Kun tiu absoluta sincero povas paroli nur spirite libera homo antaŭ mortkondamno. Sed oni ne kondamnis lin al morto. Ĉu perfortuloj embarasiĝas, kiam ili kontaktas personon, kiu agas tute sendepende, neŝablone, nekutime kaj nekompreneble por ili? Blaĵkov estis kondamnita al 10 jaroj en laborkoncentrejo plus postaj 5 jaroj de civila senrajtigo. Li estis ekzilita al Magadano.

La 1-an de junio 1952 li estis liberigita, kaj en 1955 amnestiita kun nuligo de la juĝverdikto. Jam en 1956 li partoprenas regionan artan ekspozicion en Magadan, lasante por la urbo sian verkon – la buston de la kemiisto Mendeleev, siberiano laŭ la deveno.

En 1957 N. V. Blaĵkov revenis al sia naskiĝurbo Odeso kun Lidia Lvovna Svetĉenko, edzino kaj fidela samideanino. Sub lia influo ŝi eklernis Esperanton kaj eĉ instruis ĝin al infanoj.

N. V. eklaboris en la Odesa Palaco de Junpioniroj kiel gvidanto de skulpta rondeto por infanoj. Lia “aŭditorio”



V. Eroŝenko

aĝis 8-12 jarojn; sed inter liaj lernantoj troviĝas la plej elstaraj skulptistoj de la nuna Odeso. “Por animo” li laboris por Esperanto: faris bareliefojn de Zamenhof, de la komponisto Taneev, kiu estis esperantisto, de Sergej Grigorjeviĉ Rublov, fama tradukisto kaj Esperanto-aganto, ano de la Lingva Komitato, kaj kelkaj aliaj. Antaŭe tiuj rondaj bareliefoj troviĝis ĉe la odesa E-klubo “Blanka akacio”, sed nun ĉiuj perdiĝis.

Sed vera ĉefverko lia estis la busto de Ludoviko Zamenhof, kiu longe estis la sola monumento al Zamenhof sur la teritorio de Sovetunio.

En 1961 en Odeson venis granda delegacio de esperantistoj el Varna, nia ĝemelurbo en Bulgario. La delegacio donacis al la odesaj esperantistoj broditan standardon kun la subskribo: “Al esperantistoj de Odeso en signo de frata amikeco. 1961”. Tiam, por reciproke la gastojn, odesanoj decidis donaci al ili la buston de Zamenhof! Sekvajare la busto estis preta. Oni supozas, ke estis faritaj 2 monumentoj. Unu restis en Odeso, kaj estis metita en la korto de la domo N 3 en la Deribasovskaja strato, kie loĝis tiam Blaĵkov. Kie estas la alia, nun scias neniu.

Dum la tuta vivo N.V. agis propravole kaj neoficiale. Li instruis Esperanton; li instruis skulptarton. Sed por ni ĉiuj li estis Instruisto de la Vivo. Li estis bonkora kaj saĝa persono; al li oni povis veni kun siaj demandoj, rakonti pri malĝojo aŭ feliĉo, ekscii novaĵojn el la arto aŭ el la Esperantomovado; aŭ simple sidi, kontemplant la laboron de la Majstro, kiam li kreis proprajn skulptaĵojn. Homo de eksterordinara anima riĉeco, li ĉion dividis

kun infanoj; en siaj 70 jaroj li parolis kun ni kiel kun egalaj al li mem; kaj tio estas tre grava por junulo, komencanta la vivon. Lia rondeto estis “loko, kien oni povas veni”, kiel diris Dostojevskij. En la lupa mondo infanojn oni devas eduki ne kiel lupojn, kaj ne kiel predojn por lupoj, humilajn ŝafojn. Oni devas doni al ili fortojn esti *aliaj*, kaj al la forto de krueleco kontraŭmeti la forton de bono. Tiun grandegan forton de bono kaj bonkoreco havis N. V.; kaj li dividis ĝin kun ni. Li bone sciis, ke nur la bono estas eterna, kaj senmorta estas nur tiu, kiu kreas kaj donas.

Dum lia entombigo kaj rememora kunmanĝo neniu tristis. Ekslernantoj de li ridis, kantis... Ja Nikolaj Vasiljeviĉ ne mortis! Al ĉiu el ni li donis ion, kio restis por ĉiam: profesion, scion, memcertecon, malfermis la mondon de arto, de kreado, la vastan mondon de Esperanto kun ĝia grandega humanista ideo de unueco de la homaro kaj samrajteco de ĉiuj popoloj. La “Interna ideo” de Esperanto restas unu el la plej noblaj ideoj, iam kreitaj de la homaro.¹

Nikolaj Vasiljeviĉ estis homo de estonteco. Ankaŭ tial li ne mortis. Li



vivas en siaj lernantoj. Mi diris, ke li instruis nin. Nu, pli gravas, ke li simple vivis kaj laboris apud ni.

Ĉiu homo bezonas komence de sia vivo Instruiston (kun majusklo), kiu helpas al li trovi sian vivovojojn. Kaj mi ĝojas, ke mia Instruisto en la vivo estis Nikolaj Vasiljeviĉ Blaĵkov.

Tio vere estas tre alta spirita komunumo, kiun ne ĉiu povas eniri. Veran egalrajtecon ne ĉiu povas elteni. La plimulto agnoskas nur perforton aŭ nur humilecon, kaj *egaleco* estas netolerebla por ili. Sed Esperanto temas pri *egaleco* en la plej alta senco de la vorto.



Ĉu vi volas paperan kopion de la libro “Amo, tuso kaj forpaso”?

Tuj mendu ĝin ĉe KAVA-PECH aŭ la libroservo de UEA!



Tiuj, kiuj deziras recenzi por la revuo *Esperanto*, estas invitataj kontakti la redakcion ĉe redakcio@revuoesperanto.org aŭ pere de la poŝtadreso, indikita en la kolofono. Tiuj, kiuj ricevis varon por recenzo, estas petataj sendi la recenzon aŭ kontakti la redakcion. Varojn ricevitaĵajn kaj nerekencitajn oni fakturos al la ricevinto.

PEKO – Printempa Esperanto-Kunveno 18 – 21 majo 2023

■ Liba Gabalda

PEKO estas Printempa-Esperanto-Kunveno, sed jam de kelkaj jaroj ĝi fariĝis kvazaŭ belga kongreso. Ĉi-foje oni festis la jubilean dekjarigon de “Verdaj Skoltoj”, kiuj organizis la aranĝon en la urbeto Tilff sub la gvido de Valère Doumont, nomata Lupo. La organiza teamo konsistis el dek skoltestroj kaj aliaj skoltoj inter kiuj dek ses adoleskantoj kaj ok junuloj. Estis akceptitaj tri novaj skoltoj, al kiuj oni transdonis nigra-verdan koltukon. Skoltoj havas kromnomojn, tiel aperis inter ni Abel, Bizono, Briardo, Dingo, Korsako, Magoto, Mambao, Orcino, Neĝpantero.

Tilff estas urbeto proksima al la urbo Lieĝo. Ĝi situas en profunda valo de la rivero Outhre, ĉirkaŭata de bela naturo kaj de arbaroj por agrablaj promenadoj. La urbeto famiĝis pro sia speciala karnavalo en kiu paradas “Poreuloj” – homoj trikolore vestitaj per longaj verdaj ĉapo kun sonoriloj, blankaj ĉemizoj kaj pantalonoj, kaj ĉe la piedoj pajlo ĉirkaŭas la kruojn kvazaŭ radikojn. Gigantoj akompanas la grupon. En la urbeto staras fontano kun kolono ornamita per poreuloj.

PEKO-n partoprenis ĉefe junaj homoj el Belgio, Germanio kaj Francio. Entute kvindek geesperantistoj festis la dekjarigon. Lu Wang alvenigis sep ĉinajn gejunulojn loĝantajn en Germanio same kiel ŝi. Ili ĉeestis Esperanto-kurson por komencantoj, kiun gvidis Christine Brucker laŭ diversaj instrumentoj.

Ni loĝis en renovigita farmbieno de la kastelo Brusonde el la 18-a jarcento, adaptita por diversaj kulturaj okazaĵoj. Apuda lageto kun ĉi-sezone florantaj iridoj ĉe la rando kaj nimfeoj en ĝi, ornamas la parkon kaj donas belan vidon al la kastelo. Apud la loĝejo en antaŭa garbejo troviĝas unika muzeo pri abeloj. Ĝi prezentas filmojn pri la vivo de abeloj, posedas riĉan kolekton de abelbredaj objektoj el diversaj epo-

koj kaj amason da belgaj kaj eksterlandaj abeluoj skulptitaj el trunkoj. En la muzeo estas ankaŭ instalitaj du vitraj abeluloj por ebligi spekon de la agado de la abeloj. La muzeo estis inaŭgurita en la jaro 1974-a.

Dum la evento okazis diversaj programoj. Bernard Regis prelegis kaj prezentis diversajn mapojn. Skoltoj priskribis la historion de la skoltismo, parolis pri siaj agadoj, aktivadoj, distaĵoj kaj aventuroj, kiujn ni povis spekti ankaŭ bilde. Ili rakontis pri diversaj grupoj, laboraj kunvenoj, semajnfinoj kaj tendumadoj. Ni eksciis multon pri skoltismo – pri la tutmonda movado, pri ĵamboreoj, totemoj, diversaj insignoj kaj simboloj. Ili konigis al ni la skoltajn leĝon kaj promeson kaj informis ankaŭ pri vojaĝkonkurso kaj muzikalo dum la IJK. La himno de la Verdaj Skoltoj estas: “La aŭto de la ĉef’...” Ili kunvenis krom en Belgio ankaŭ en Francio, Germanio, Hispanio kaj Nederlando. En la ĵaŭda vespero Ideal Gabalda organizis cirklodancadon. Ĉiuj fervore sekvis la instrukciojn kaj bone amuziĝis.

Dum la tago la partoprenantoj distriĝis per diversaj ludoj, kunkantis, provis muziki per tubetoj, konstruis simplajn aŭ pli komplikajn objektojn per lignaj bastonetoj, branĉetoj, tolaĵoj, papero kaj ŝnuretoj, faris origamion, ŝtofkolorigis ĉemizojn aŭ sakojn. Okazis ankaŭ gustumado de bieroj, kaj vespere eblis spekti filmojn aŭ ĉeesti nok-

tan ekskurson. Por la posttagmezoj estis organizitaj ekskursoj – vizito al la urbo Lieĝo kaj kajakado sur la rivero Outhre, kie kelkaj spertis banadon ĉe renversiĝo de kajakado. Iuj piedpromenis ĝis la abatejo Brialmont. Sur la ludtereno de la bieno aperis ankaŭ alia skolta grupo.

Ni manĝis precipe vegetare, kelkaj vegane. Bongustajn pladojn kuiris por ni Ella Strug kaj Eddy Van den Bosch kun la helpo de skoltoj en la kuirujo. Ni havis okazon gustumi ankaŭ ĉinan manĝaĵon (farĉitan pastaĵon) pretigitan de ĉinaj gastoj kaj anas-ovojn, kiujn provizis Valère. Ne mankis ankaŭ frititaj bananoj kun fandita ĉokolado, specialaĵo de Verdaj Skoltoj. Ĉi-foje ili ne estis rostitaj rekte super fajro kiel oni kutimas fari en la naturo, sed bakitaj en la forno.

Antaŭ la dimanĉa forveturo estis anoncita la premio de la “Granda ludo”. La gajnintoj ricevis jubilean bele ornamitan botelon, kian ankaŭ eblis aĉeti por subteni la skoltan movadon.

Bone funkciis la libroservo de FEL. Esperantistoj el Lieĝo eldonis dulingvan libreton pri Tilff en Esperanto kaj la franca. En la lasta vespero prezentigis la orkestro de tubistoj kaj la skeĉo pri “Kion diras vulpo?”. Poste ni ĝuis koncerton de Jonny M, sekvan de diskomuziko. Ĉiuj bone amuziĝis ĝis malfruaj horoj. Estis agrabla etoso inter junaj skoltoj. Dankon al la organizantoj!



Aliroj al strategia laborplano: resume kun detalo pri la kvara

■ Duncan Charters

En la junia numero de la revuo, mi priskribis kvar kernajn kampojn aŭ temojn por nia sukceso:

1. Kapablo kunlabori – esenca kondiĉo por progreso
2. Informado pri nia lingvo kaj komunumo
3. Instruado kaj lernado de Esperanto
4. Rilatoj kun la ekstera mondo

Pri la unua, konata devizo por nia standardo estas kaj restas “Unueco estas forto”. Se ni reciproke subtenos nin en niaj diversaj iniciatoj, ni povos atingi multe pli ol se ni agas kolizie aŭ individue sen tiu kunagado. Pri la dua, necesas ke ni multe pli efike laboru por ke neniu en la mondo ne estu aŭdinta pri Esperanto kaj tio kion ĝi celas. Antaŭ semajno mi havis konversacion kun usona paro kiu neniam antaŭe eĉ aŭdis la nomon Esperanto. Pro manko de informoj ili apenaŭ kredis ke ĝi povas ekzisti. La edzino spontane diris ke hejme ŝi tuj iros al Guglo por serĉi informojn (ĉu ni pretigis la reton por favoraj respondoj al tiaj enketoj?). En Pollando, okaze de la ceremonio pri transdono de la Biblioteko Hector Hodler al la Nacia Biblioteko de Pollando,

ni profitis la okazon por atingi milojn da televidspektantoj per iniciato de niaj Bibliotekaj amikoj. Pri la tria, ni jam parolis pri la aparte bonega okazo kiun ni havas nun por prezenti Esperanton ne nur kiel lingvolernan faciligon, sed kiel ankaŭ egalecan tutmondan kulturperilon.

Kio pri rilatoj kun la ekstera mondo? En baldaŭ aperonta Gazetara Komunikado kaj en aliaj raportoj vi legos pri ĵus okazinta virtuala kunsido pri multlingveco de ne-registaraj organizaĵoj (NRO-j) de Unuiĝintaj Nacioj, kun preskaŭ 200 partoprenantoj. Kulmino (sed certe ne fino) de multjara organizado de konferencoj sub aŭspicio de CED, ESF kaj la Novjorka oficejo de UEA ĉe UN, kun la celo atentigi pri la neegaleca uzo de lingvoj en internaciaj rilatoj. La kunsido kunigis interalie reprezentantojn de diversaj nacioj-ŝtatoj, aliajn diplomatojn, NRO-representantojn, fakulojn-sciencistojn, tradukistojn kaj interpretistojn. Esperanto estis egalrajta lingvo kun la ses oficialaj de UN por la interpretado, kaj tri el la ĉefaj prezentaĵoj estis en Esperanto, kun interpreto en la aliajn lingvojn. Plurlingve ĉefparolis komence pri la neceso respektive agnoski la rajtojn de

ĉiuj lingvoj, ne nur la ĉefajn uzatajn de UN, la prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de UN, Csaba Kőrösi. Li entuziasme apogis la kunsidon, organizitan de niaj reprezentantoj Francis Hult kaj Humphrey Tonkin. Per tiu kunsido aldone al antaŭaj, UEA altiris al si la respekton kaj dankon de multaj, kiuj sentas lingvan diskriminacion en internaciaj rilatoj, kaj eblis per tiu komprenemo komuniki kiel Esperanto kontribuas al tiu dezirata sendiskriminaciigo. Per tia agado ni daŭre akiras ĉiam pli da respekto kaj pli da amikoj, kio havas multe pli longdaŭran efikon ol aliaj iniciatoj kiel la konata petskribo al UN, kiu vidigis Esperanton dum la kolektado de subskriboj kaj la ceremonia prezento al oficisto de UN, sed ne atingis poste daŭran efikon aŭ agnoskon. Se ni apogus tiajn iniciatojn je ĉiuj niveloj, internacie, nacie kaj loke, Esperanto fariĝos ĉiam pli konata ne kiel marĝena instrumento de fanatikuloj, sed kiel aŭtenta alternativo al lingva diskriminacio kaj kontribuo al konsciigo pri la necesa respekto de lingvaj rajtoj en internaciaj organizaĵoj kaj en la mondo ĝenerale. Kion alian ni povos kontribui por kunpilgrimi kun aliaj al pli paca kaj komprenema mondo, por kiu Esperanto nature evidentiĝos kiel unu el la plej efikaj rimedoj por tion atingi? Precize tie koincidu la kvar ĉefaj celoj de nia laborplano.

Oficiala Informilo

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



SOCIETO ZAMENHOF

Hungario: P.P. Denke.
Italio: M. Lipari.
Kanado: W. du Temple.
Korea Resp.: Kang H.
Svedio: M. Häggström.

PATRONOJ de TEJO

Hungario: P.P. Denke.
Vjetnamio: Vuong Q.C.

DONACOJ

ĝis la 5-a de junio 2023

Amsterdamo Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto

Nederlando: Esperanto Nederland 250,00. Pere de Esperanto Nederland krome donacis A. Bakker-ten Hagen, "BW",

L. Demmendaal, M. Erasmus-van Zadelhoff, J. van der Hoek, R. Moerbeek, B. Muizelaar-Borger, Sekcio Haarlem de Esperanto Nederland 6500,00. Sumo ĉi-jara: 8850,00.

Blindula kaso

Usono: R. Keveess-Cohen 50,00. Sumo ĉi-jara: 50,00.

Fondaĵo Afriko

Finnlando: B. Eriksson 200,00. *Germanio:* S. Hauge 70,00. *Usono:* R. Keveess-Cohen 50,00. Sumo ĉi-jara: 5706,23.

Fondaĵo Canuto

Luksemburgo: I. Ertl 20,00. *Nederlando:* R. Moerbeek 25,00. Sumo ĉi-jara: 772,49.

Konto Espero

Britio: Brita Kongreso 320,00. *Usono:* R. Keveess-Cohen 100,00. Sumo ĉi-jara: 444,00.

Agado Timoro

Belgio: K. Tytgat 100,00. *Usono:* R. Keveess-Cohen 50,00. Sumo ĉi-jara: 150,00.

Ĝenerala Kaso

Alianco 365: 155,00. Sumo ĉi-jara: 6422,89.

Estrara Raporto pri la agado de UEA en 2022

La Estraro de UEA en junio 2023:

- Duncan Charters (Prezidanto)
- Aleks Kadar (Ĝenerala Sekretario)
- Jérémie Sabiyumva
- Fernando Maia Jr. (1-a Vicprezidanto)
- Aurora Bute
- So Jinsu
- Amri Wandel (2-a Vicprezidanto)
- François Lo Jacomo
- Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer



Ĉi jare la jara raporto de la Estraro de UEA aperas en la julia-aŭgusta numero de Esperanto. Se vi deziras legi pli da detaloj, estas aliaj raportoj tra la jaro troveblaj ĉiuj en la retejo de UEA: <https://uea.org/teko/komitato>.

Enkonduko

En ĉi tiu Estrara raporto pri la agado de UEA en la jaro 2022, vi konstatos kiom antaŭeniris niaj planoj por la estonteco kaj kio estas jam atingita. Tio daŭros en 2023, ĉar al la sukcesa transpreno de la arĥivo de UEA fare de la Aŭstra Nacia Biblioteko kaj Esperanto-Muzeo (ÖNB) en 2022 aldoniĝos la profesia prizorgo de la Biblioteko Hector Hodler en la nuna jaro.

Konsciigo

Informado:

Laborgrupeto, tiel nomataj “zorgantoj pri informado”, gvidata de Renato Corsetti, provis helpi la estraron

pri informado de UEA. Kiel kutime ili zorgis, por ke la movado tutmonda festu kelkajn tagojn aparte tiujn rekte kunligeblajn kun la agado de la Esperanto-movado por Esperanto: la tagon de gepatraj lingvoj kaj la tagon de Esperanto, por kiuj oni pretigis afiŝojn kaj tekstojn en pluraj lingvoj, kiuj aperis kaj en la reto kaj en paperaj komunikiloj. La listo ‘informa-reto-pri-esperanto@groups.io’ funkciis tra la tuta jaro por kunordigi la agadojn de la informantoj tra la landoj. En 2022 esti serio de agadoj de la eŭropaj esperantistoj direktita al la funkciuloj kaj al la politikistoj en EU-instancoj por montri al ili la avantaĝojn de Esperanto por certigi la multlingvecon de Eŭropo. En 2022 estis ankaŭ interkonsentitaj la gvidlinioj por igi la Esperanto-tagon, la 26-an de julio, kaj vera movada festo je

ĉiuj niveloj kaj formala propono al Unesko por deklaro de la Internacia Tago de Esperanto. Okaze de la Zamenhof-tago (15.12), UEA komunikis pri la Esperanto-vortoj aperantaj sur la oficialaj pilkoj Al Rihla kaj Al Hilal de la Futbala Mondpokalo 2022 kaj gratulis al Adidas kaj Fifa pro la elekto utiligi Esperanton.

Poliglota agado:

UEA estis en 2022 ĉefsponsoro de la Poliglota Renkontiĝo, kaj la ĉeesta, kaj la reta. En ambaŭ eventoj Esperanto estis vaste disvastigita... En la eventoj partoprenas lingvemuloj, kiuj ne ĉiam estas bone informitaj pri Esperanto. Tamen pro tio, ke ne temas pri Esperanto-eventoj, sed pri poliglota eventoj, nia strategio estas, ke la informado pri Esperanto okazu ekvilibre kaj donu rigardojn al la Esperanto-agado en la mondo, kiuj ne ĉiam estas evidentaj al la ĝenerala publiko, do ne nur pure lingva prezento de Esperanto. Kelkaj el la diversaj okazoj de tia prezentado de Esperanto spekteblas en la jutuba kana-

lo de la evento (<https://mallonge.net/118>). Por la reta evento 2022 UEA proponis tri sponsoritajn prezentojn Esperantorilatajn, kunlabore kun partneroj kiel TEJO kaj aliaj. Kiel ĉefsponsoro UEA i.a. havis inaŭguran saluton dum la malferma ceremonio: la Prezidanto de UEA, Duncan Charters, salutis la publikon kaj parolis pri UEA kaj la idearo de justa kaj facila komunikado, kiun ĝuste Esperanto reprezentas. La programo aldone enhavis 3-klasan (daŭrigan) rapidkurson de Esperanto per la hispana (fare de Luis Obando), prelegon en la itala pri Esperanto kaj Interlingvistiko (fare de Federico Gobbo, katedrulo en la Universitato de Amsterdamo) kaj plurlingvan (angla/pola/Esperanto/alijaj) debaton *Why so English?* ("Kial tiel angla?") pri tio kiel stimuli plurlingvismon en medioj regataj de la angla (fare de la TEJO-volontulo Wojtek Oreszczuk el Pollando). Plie estis pluraj paroligaj babilĉambroj pri Esperanto kaj esperantistoj mem proponis diversajn aliajn programerojn kun tre varia aliro. Krome, en la eventa platformo estis skriba prezento de UEA kun invito membriĝi kaj deko da esperantistaj aktivuloj agantaj pri instruado kaj informado estis invitataj aliĝi senpage pere de la sponsoreco de nia Asocio.

Eksteraj rilatoj:

Pluraj teamoj reprezentas UEA en pluraj oficejoj de Unuiĝintaj Nacioj: en Nov-Jorko Humphrey Tonkin kaj Francis M. Hult; en Ĝenevo sesmembra teamo gvidata de Cesco Reale (kun Alain Favre, Alessio Sacha Giordano, Mireille Grosjean, Nicole Margot kaj Adrian Tanner); en Vieno Hans Michael Maitzen, Alfred Heiligenbrunner kaj Norina Florineth; kaj en Parizo, sidejo de Unesko: François Lo Jacomo, Barbara Despiney kaj Didier Loison, kun laŭokaza helpo de Renée Triolle, Gilles Tabard, Nathalie Kesler kaj Martine Demouy. La formalizaĵoj pri nomumo de UEA-representantoj ĉe UN prizorgas Sara Spanò kun la Ĝenerala Direktoro de UEA. Informas pri nia agado Rafael Lima, interalie per la retejo www.esperantoporun.org, la blogo unesperante.wordpress.com, la sociaj retoj twitter.com/UNEspanante, [instagram.com/un_esperante](https://www.instagram.com/un_esperante). Jon Liechty prizorgas Facebook-paĝon pri UN-aferoj (nomo: UN kaj internaciaj aferoj), kaj de pli ol dek jaroj H. Tonkin redaktas



ĉiun duan monaton tri- aŭ kvarpaĝan informilon Esperanto por UN, en la angla kaj en Esperanto: tradukas al la franca G. Tabard, dissendas kaj aperigas rekte Sofiya Soskina, helpata de Ulrich Becker. Eblas ricevi (ekzemple dum UK) dekpaĝan jaran raporton pri rilatoj kun UN kaj Unesko en 2022 verkitan de H. Tonkin kaj broŝuron *Unesko kaj Esperanto* verkitan de F. Lo Jacomo.

Post lanĉo, antaŭ kvin jaroj, de la esperantlingva versio de *Unesko-Kuriero* – daŭre aperanta, sed sub la respondeco de Ĉina Internacia Eldona Grupo – *El Popola Ĉinio* (Chen Ji) – Trezoro Huang Yinbao, vicprezidanto de UEA ĝis aŭgusto 2022, daŭrigis sian agadon per tradukado kaj laŭtleĝado en serio de videoj de la infanlibro *Vi estas mia heroo*, kiel infanoj batalas kontraŭ KOVIM-19, eldonita de IASC, Inter-Agency Standing Committee, humanitara kunordiga platformo de la UN-sistemo. El la esperantlingva traduko (aperinta en 2020) de la prestiĝa libro *De ideoj al agoj, 70 jaroj de Unesko*, li kreis 46 videojn rakontante pri Unesko. Diskonigi per esperantlingvaj eldonaĵoj la programojn de Unesko kaj UN estas unu el niaj daŭraj agadoj: ankaŭ en 2020 aperis *Gvidilo al la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj* sub redakto de Rakoen Maertens kaj H. Tonkin. Okaze de 19 internaciaj tagoj (Edukado 24.01, Memoro de la viktimoj de la Holokaŭsto 27.01, Gepatra lingvo

21.02, Virinoj 08.03, Rasa Diskriminacio 21.03, Familioj 15.05, Kultura diverseco 21.05, Rifuĝintoj 20.06, Amikeco 30.07, Indigenaj popoloj 09.08, Paco 21.09, Tradukado 30.09, Pliaĝuloj 1.10, Neperforto 02.10, Unuiĝintaj Nacioj 24.10, Toleremo 16.11, Infanoj 20.11, Homaj Rajtoj 10.12, Solidareco 20.12) kaj de niaj Esperanto-tago 26.07 kaj Zamenhofa tago 15.12, UEA (H. Tonkin, R. Lima, R. Corsetti...) laŭeble sendas mesaĝojn kaj afiŝojn tradukitajn en plurajn lingvojn. Apud la monda tago de Afriko (25.05) kaj de Afrika heredaĵo (05.05) ekzistas ekde 2019 monda tago de afrika kaj afrik-devena kulturo (24.01), kaj la Afrika Komisiono de UEA verkis deklaron (<https://mallonge.net/119>) ĉi-okaze.

Ankaŭ pri la Internacia Tago de la Franca Lingvo (20.03), kiu estis ankaŭ la 101-a naskiĝtago de Amadou Mah-tar M'Bow (daŭre vivanta en Senegal: li favoris Esperanton, kiam li estis Ĝenerala Direktoro de Unesko, inter 1974 kaj 1987), ni raportis en 2022, sed fine ni decidis ne aldoni la internaciajn tagojn pri la lingvoj de UN al nia listo de celebrindaj datoj. Cetere, ne nur UN-lingvoj ricevis siajn internaciajn tagojn: en 2021 Unesko agnoskis Mondan tagon de la suahila lingvo (07.07) kaj en 2015 Mondan tagon de la romaa lingvo (05.11): la argumentoj por konvinki la ŝtatojn de Unesko agnoski tiujn ĉi mondajn tagojn povos helpi nin en nia klopodo agnoskigi la 26-an de julio monda tago de Esperanto. Ĉefe gravas, ke multaj ŝtatoj proponu al Unesko tiun ĉi mondan tagon de Esperanto: ni petis ĉiujn landajn asociojn kontakti tiucele siajn landajn delegitarojn ĉe Unesko, deko da ili reagis pozitive kaj kelkaj ekagis, tamen la vojo estis ankoraŭ malfacila. Ankaŭ pri registrado de Esperanto kiel nemateria kultura heredaĵo de la homaro, ni klopodas de pluraj jaroj: jam Pollando (2014) kaj Kroatio (2019) akceptis Esperanton en siaj naciaj listoj de nemateria kultura heredaĵo de la homaro kaj en kelkaj aliaj landoj la klopodo survojas.

Ni profitu la internacian jardekon de indigenaj lingvoj (2022 – 2032) por progresigi la konsciigon pri la rajto je komunikado kaj la utileco de Esperanto: "UEA havas duoblan taskon: konvinki la homojn en kaj ĉirkaŭ UN pri la utileco de Esperanto, sed, jam antaŭ tio, konvinki la homojn pri la efektiva ekzisto





de aŭtentike bremsaj lingvaj problemoj”, H. Tonkin skribas en sia jarraporto 2022. “Oni povas eviti rasan diskriminacion per senpartia pritrakto de ĉiuj homoj, senkonsidere pri raso – sed oni ne povas simple senpartiece nediskriminacii pri lingvoj: oni devas elekti unu lingvon aŭ alian en difinita cirkonstanco. Ja ne eblas paroli ĉiujn lingvojn samtempe”, li aldonas. Indiĝenaj lingvoj estis la ĉeftemo de niaj kongresoj, Universala Kongreso en Montrealo kaj novembra Virtuala Kongreso, kaj UEA subvenciis la 13-an forumon de neregistaraj organizoj ĉe Unesko, en novembro 2022 en Otavo, pri la komenciĝanta jardeko de indiĝenaj lingvoj. Prelegis F. Hult kaj Mark Fettes (kiu gvidis tiun ĉi temon dum la UEA-kongresoj) kaj ĉeestis F. Lo Jacomo.

Pli ĝenerale UEA devas kunlabori en la Unesko-agadoj. A. Heiligenbrunner, en Vieno, iĝis vic-sekretario de la Komitato de NROj pri Paco, konstanta komitato de CoNGO (Konferenco de NROj en konsulta rilato kun UN), Anna Bennett gvidas virtualajn rendevuojn de grupo de virinaj aferoj. M. Grosjean modelas reprezentis UEA en konferenco pri edukado en Ĝenevo. Ŝi kandidatis “Scio sen bariloj” al premio de Unesko por edukado de virinoj kaj knabinoj. F.M. Hult intervenis en junio okaze de konsultigo kun Csaba Kőrösi (tiame kandidato kaj poste prezidanto de la Ĝenerala Asembleo), en julio kun H. Tonkin per referaĵoj ĉe flanka aranĝo de la

Altnivela Politika Forumo de UN (pri lingvo en edukado), kaj H. Tonkin intervenis en novembro okaze de kunsido de la Komitato pri NROj de Ekosok. En Unesko okazas en ĉiu nepara jaro (novembro 2021, novembro 2023...) Ĝenerala Konferenco, dum kiu ĉiu ŝtato kaj trideko da neregistaraj organizoj (inter kiuj lastatempe UEA) rajtas alparoli la plenan kadre de la debato pri ĝenerala politiko. Kaj en ĉiu para jaro (decembro 2022...) okazas internacia konferenco de la NROj, kiu interalie elektas la ligkomitaton de NROj ĉe Unesko: tiu ĉi reprezentas la NROjn ĉe Unesko kaj gvidas la agadprogramojn deciditajn de la konferenco, organizante forumojn kaj aliajn eventojn. Duan fojon UEA kandidatiĝis al tiu ligkomitato, sed la elektosistemo igas ege malfacile al eŭropa asocio esti elektita, krom se ĝi akiris asocian rilaton kun Unesko. El 411 NROj en rilato kun Unesko, 65 estas en asocia rilato kaj 346 en konsulta rilato, kaj UEA principe plenumas la kondiĉojn por kandidatiĝi al asocia rilato.

Kreiĝis antaŭ deko da jaroj grupo de trideko da NROj en rilato kun Unesko, kiuj organizis eventojn jam en 2014 kaj 2018 okaze de la Internacia Tago de Paco (21.09). En 2019, ĝi planis novan eventon por 2020, kaj ties gvidanto Michel Thouzeau mem proponis, ke Esperanto estu unu el la laborlingvoj de tiu ĉi evento, kiu kunigu kantojn de korusoj el la tuta mondo. Ni multe reklamis tion ekde la UK en Lahtio, sed pro la pandemio la evento estis prokrastita al 2022. Esperantistoj alportis konsiderindan kontribuon, kaj al la kolektado de filmoj de korusoj el la tuta mondo, kaj al la surloka evento, en Toloso (Eŭskio – Hispanio), la 17-an de septembro, kie ĝi venigis internacian koruson gvidatan de Zdravka Boytcheva, danke al subvencioj de UEA kaj Pangeo (inĝenierado pri paco) kaj al mecenatoj. Nur tri aliaj korusoj partoprenis en Toloso: eŭska, madrida kaj kolombia. Filmoj pri tiu ĉi evento estis prezentitaj dum la Virtuala Kongreso de UEA kaj daŭre spekteblas en la reto.

Jam de 1983 UEA kunlaboras por realigi pli ol tridek konferencojn pri lingvaj demandoj kaj UN. Organizas ilin Studogrupo pri Lingvoj kaj UN – fakuloj pri lingva politiko, funkciuloj kaj diplomatoj ĉe UN, kunlabore kun nia CED, Centro de Esploro kaj Dokumentado.

Subvencias la konferencojn ESF, Esperantic Studies Foundation. Volumo de kontribuoj de iamaj partoprenintoj aperas en 2023 sub la titolo *Language and Sustainability* (red. Lisa McEntee-Atalianis kaj H. Tonkin), kun, interalie, kontribuoj de M. Fettes kaj F. M. Hult. Kontraste al la konferenco de 2021, kiu estis virtuale organizita en kunlaboro kun la Universitato Princeton kaj nombris pli ol 500 partoprenantojn, la konferenco en 2022 estis relative modesta virtuala aranĝo tra du tagoj – pri lingvaj efikoj de la pandemio. Ĝi estis aranĝita kunlabore kun la Komitato de NROj pri Lingvoj. Informoj kaj raportoj troveblas ĉe www.languageandtheun.org.

La kreado de tiu ĉi Komitato de NROj pri Lingvoj estas grava atingo en 2022. Ni memorigu, ke UEA estis elektita estrarano de CoNGO (Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun UN) unuafoje en marto 2018, kaj ree en decembro 2021, ĝis 2025. En 2022, malgraŭ la pandemio, H. Tonkin restis en kontakto kun la prezidanto de CoNGO kaj virtuale reprezentis CoNGO en la Forumo de la Monda Konferenco pri la Informada Socio (Ĝenevo, majo 2022). Li partoprenis du kelktagajn virtualajn estrarkunsidojn de CoNGO (marto kaj oktobro), kaj kunsidojn de la Financa komitato de CoNGO. La Komitato de NROj pri Edukado (kie UEA ankaŭ membras) ne kunvenis en 2022. Sed la Komitato pri Lingvoj (CoLL), kreita en septembro 2021 kaj inaŭgurita en decembro 2021 per publika kunveno pri Multlingvismo kaj Unuiĝintaj Nacioj, organizis en 2022 plurajn aranĝojn, interalie pri multlingvaj iniciatoj de Unesko kaj pri multlingvismo kaj KOVIM-19. Ĝi gastigis en majo la simpozion de la Studogrupo pri lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj. En julio, ĝi kunvenigis flankan aranĝon de la Altnivela Politika Forumo, kaj en novembro ĝi organizis dialogan forumon kun Fernand de Varennes, Speciala Raportisto de UN pri Minoritataj Demandoj. La 18-an de majo, estis elektita ĝia estraro, kun F.M. Hult kiel prezidanto, H. Tonkin kiel vicprezidanto, Hans E. Becklin (reprezentanto de TEJO ĉe UN) kiel kasisto, kaj Linda Fitchett (reprezentanto de AIIC, internacia asocio de konferencaj interpretistoj) kiel sekretario, plus Allison Rodriguez (reprezentanto de FIT, Internacia Federacio de Tradukistoj) kaj Daniel LeBlanc

(reprezentanto de VIVAT Internacia) kiel estraranoj. En aprilo, F. Hult prezentis la celojn kaj funkciojn de la komitato al la Amikaro de la Hispana Lingvo ĉe UN; en majo, H. Tonkin prelegis pri multlingvismo por informo kaj komunika teknologio en la Forumo de la Monda Pintkonferenco pri la Informada Socio... Kaj ili kunvenis formale kaj neformale kun la membraj ŝtatoj Argentino, Bangladeŝo, Kostariko kaj Hispanio, kun la Oficejo de la Kunordiganto pri Multlingvismo ĉe UN, la Internacia Organizo de Francparolantaj Landoj, la Interkomunika Oficejo de Unesko en Novjorko ktp...

Pro la pandemio, ni al kutimiĝis al virtualaj kunsidoj, tamen nun denove eblas ĉeestaj kunsidoj. En Unesko, tiu ĉi eblo estas malhelpata pro la fakto, ke ne plu eblas kunveni senpage en iu ajn ĉambro de Unesko: foje ni kunsidas diskrete en angulo de la manĝejo. En Novjorko, de pli ol kvardek jaroj UEA luprenas spacon ĉe prestiĝa adreso, fronte al Unuiĝintaj Nacioj, 777 UN Plaza. En la komenco temis pri tuta oficejo, sed nuntempe UEA dividas modestan oficejon kun kelkaj aliaj NROj, kiu estas sufiĉa por nia modesta bezono. Ĝi ebligas kontaktojn kun aliaj NROj en la sama konstruaĵo (interalie kun CoNGO) kaj okazan uzadon de kunvenĉambroj.

Kapabligho

Instruado, Rilatoj kun ILEI, kun Edukado.net kaj kun la Akademio de Esperanto (AdE):

En 2022 UEA subtenis ILEI por diskonigi la 3-an Virtualan E-Kongreson de ILEI (VEKI-3) kaj simpozion de ILEI, spektblajn ankaŭ en la jutuba kanalo de UEA: youtube.com/UEAviva. Dum la UK en Montrealo okazis la Tago de la Lernado, kompilita, nome de ILEI, de Maria Beloŝević, kaj okazis ankaŭ fak-kunsido de ILEI. Dum la Virtuala E-Kongreso de ILEI (VEKI-3) okazis diskut-rondo pri pli efika tri-latera kunlaborado inter UEA, TEJO kaj ILEI, kiun gvidis D. Charters, Albert Stalin Garrido kaj Ahmad Mamduhi. UEA kunlaboris kun ILEI por kandidati la projekton "30 Oraj Horoj" (kiel projekton de ILEI) kaj la ekologian animacion "Kungfua Kuniklito" (kiel projekton de la Fondaĵo NingNa) por la Premio Hamdan de Unesko.

La KER-Ekzamena Centro de UEA kunlabore kun [Edukado.net](https://www.edukado.net) okupiĝis pri la restartigo de la ekzamsistemo de UEA, testante la novan nivelon C2, kreante la teknikajn bazojn de la retaj ekzamenoj kaj organizante la unuajn retajn ekzamenojn. Sekve, la nova ekzamen-nivelo C2 kaj la retaj ekzamenoj debutis en 2022. En la jaro estis retaj ekzamen-sesioj, ĉeestaj ekzamenoj dum la UK en Montrealo kaj okazis la 10-a Tutmonda Ekzamentago, dum kiu la ekzamenoj estis je kvar KER-niveloj, B1, B2, C1 kaj C2. Entute 187 personoj trapasis sukcese ekzamenojn <https://mallonge.net/11a>. [Edukado.net](https://www.edukado.net) zorgas pri registro de Esperanto-kursoj en la mondo [edukado.net/kursejo](https://www.edukado.net/kursejo). En la lasta jaro observeblis iom da kresko en la registradoj. Gvidis tiujn laborojn Katalin Kováts nome de la KER-ekzamena komisiono.

En 2022 UEA kaj la Akademio de Esperanto (AdE) oficialigis partnerecon por agnosko kaj funkciigo de la KER-ekzamsistemo de UEA (inkluzive de la reta ekzameniĝo), laŭ kiu AdE povas validigi la ekzamenojn por la nivelo C2. Sekve, la nova nivelo C2, kiu premieriĝis dum la UK en Montrealo, havis la agnoskon de la Akademio.

Sukcese okazis Esperanto-kurso en Senegalio prepare al la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, projekto komuna de UEA, ILEI, sub aŭspicio de la Kampanjo Hans Bakker, konceptita de M. Grosjean. La Afrika Komisiono de UEA sendis al Senegalio 2 instruistojn kaj ilia laboro estis rimarkinda.

UEA subvenciis ILEI (3000 EUR) kaj Edukado.net (500 EUR).

Universitata agado:

La jaro 2022 estis la kvara jaro de la dua mandato de prof. Federico Gobbo ĉe la katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo. Krom instruado al studentoj (duono el nederlandanoj, la aliaj ĉefe el EU) la katedro interalie partoprenis la Erasmus+an projekton pri daŭripovo inter Nederlando kaj Germanio, kaj publikigis fakartikolon pri la lingvaj aliroj de Esperantaj denaskuloj kompare kun denaskaj nesurdaj signolingvanoj, kune kun du kolegojn, respektive el Usono kaj Ĉinio. Ankaŭ en Poznano, sub gvidado de Ilona Koutny, apud la trijaraj Interlingvistikaj studoj (2021 – 2024) komenciĝis dujaraj magistras studoj pri in-

terlingvistiko kun deko da ĉinaj studentoj. Februare de 2022 daŭris kaj finiĝis entute ses-semajna serio de dulingvaj (en la persa kaj Esperanto) ret(sem)inarioj kun la titolo "Internacia retinariaro pri Turismo kaj Esperanto", organizita de la Scienca Asocio de la Universitato de Tehrano pri Turisma Administrado kun helpoj de UEA, ILEI, IrEA kaj kadre de IKIKO. La registraĵoj de la retinarioj spektblas en la jutuba kanalo de UEA, UEA viva <https://mallonge.net/11b>. En la Zaozhuang-Universitato en la urbo Zaozhuang, Ĉinio, 25 studentoj diplomiĝis en la Esperanto-fako. Ili ricevis diplomon de literatura bakalaŭro kaj la lernofinan ateston de la fako. Nun 23 gestudentoj studas en la fako kaj ĉi-jare plu varbiĝis 25 novaj studentoj por la fako. En septembro okazis la dua parto de la seminario "Esperanto-Paradigmo" sub la aŭspicioj de la Franc-Germana Universitato, ĉi-foje en la Universitato de Bonn, Germanio. La temo estis *Esperanta pacismo laŭ diversaj perspektivoj*, la emfazo estis sur la pacifistaj praktikoj de la Esperanto-movado.

Dum la jaro 2022 UEA regule partoprenis en la labor-grupo 'Esperanto en universitatoj' de ESF/UEA/ILEI/TEJO kun IrEA funkcia en la kadro de ILEI kaj celanta kunteni kaj kunlaborigi esperantistojn laborantajn en universitatoj. Okazis zoom-kunvenoj ĉiun monaton, sub la nomo "Kunpens(ig)ado pri Esperanto kaj Universitatoj", en kiuj oni diskutis pri agadoj okazantaj en pluraj universitatoj tra la mondo. Sekve de interkonsentoj estis aranĝitaj prelegoj en Esperanto fare de eksterlandaj profesoroj en virtualaj kunvenoj. La nombro de kunligataj universitatoj restis daŭre pli ol 100 kaj proksima al 150.

Esploro kaj Dokumentado:

La Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) festis sian 70-jariĝon per okazigo de la 44-a Esperantologia Konferenco dum la 107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo. La konferenco, kies temo estis "CED 70-jara: bilanco pri la kontribuoj de Esperantologio al sociaj, politikaj kaj lingvistikaj fakdebatoj", okazis por la unua fojo hibride. Aperis kvar numeroj de *Informilo por interlingvistoj* (eldonita de ESF nome de CED). Daŭre funkcias la retejo *Interlingvistiko.net* kaj la konto de CED ĉe Twitter: @CED_Interling.

Aktivula trejnado:

En 2023 oni atingos la nombron de 100 seminarioj. Dum 2022, entute okazis rekorda nombro de 15 AMO-seminarioj, de AMO-82 ĝis AMO-96. Seminarioj okazis en kvar el la kvin kontinentoj. Novaj temoj en 2022 gamis tra Internacia Amikeco, spacesplorado, sociaj retejoj, arĥivado kaj vortara farado. ILEI kunlaboris en AMO-89, kiu okazis kadre de ilia virtuala kongreso VEKI-3. La aprila seminario en la kultura centro Greziljono disvolviĝis ene de la projekto VERDEN, kiu ricevis financadon de Eŭropaj instancoj, pro sia subteno de ekologiaj solvoj en la kampo de transporto. Unuafoje la AMO-programo bonvenigas novan fakan asocion: ELF-AREK, kiu okupiĝas pri filatelo kaj kolektado. La revuo de UEA regule subtenas la programon per la aperigo de jara resumo en ĉiu januara numero depost 2014! La kompletan raporton eblas legi en la decembra numero. Daŭre funkciis la retejo *Aktivulo.net*.

Komunumo

Universala Kongreso 2022 en Montrealo:

Unuafoje post dujara paŭzo pro la pandemio okazis fizike la UK (6-13.08), la unua organizita de nova Kongresa Fakto. Al la 107-a UK en Montrealo aliĝis 837 kongresanoj el 56 landoj. Parto de la programeroj unuafoje okazis hibride: la Komitatkunsidoj (kun ĉ. duono surloke kaj duono defore), la prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kaj de la Scienca Kafejo, la IKU-inaŭguro, la Faka Forumo, la Esperantologio



Konferenco kaj la Scienca Forumo. La Komitato elektis ok-kapan novan estraron de UEA, kun prezidanto Duncan Charters, unua vicprezidanto Fernando Maia Jr., dua vicprezidanto Amri Wandel kaj Ĝenerala Sekretario Aleks Kadar. La ceteraj estraranoj estas Aurora Bute, François Lo Jacomo, Jérémie

Sabiyumva, So Jinsu. La kongresa temo estis “Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indigenaj Lingvoj” reĝisorita de M. Fettes. Estis aljuĝitaj 12 diplomoj pri Elstara Agado kaj la Premio Deguĉi iris al Osio-ka Takeo.



Virtuala Kongreso (VK3):

Sekve de la sukcesa okazigo de la Virtualaj Kongresoj 1 kaj 2 organizitaj de la Estraro kaj E@I anstataŭ la UK en 2020 kaj 2021 respektive, la sama teamo organizis en novembro 2022 (24-27.11) la VK3. Aliĝis pli ol 1450 personoj kaj efektive partoprenis preskaŭ mil. La programo havis pli ol 300 programe-



rojn. Paralele okazis Retoso-2 de TEJO, kun 50 programeroj. La VK3-platformo restis alirebla ĝis la fino de januaro 2023. La 6 numeroj de Facila Vento, la reta bulteno de VK3, legeblas en la retejo de la revuo Esperanto: https://revuoesperanto.org/facilaj_ventoj.



Preparoj por UK24:

La Estraro kune kun la Kongresa Fakto multe laboris por prepari la kondiĉojn por konsideri la proponon kongresi en 2024 en Aruŝa, Tanzanio. La kulmino de tiu laboro estis okazigo de virtuala kunsido inter kelkaj estraranoj, la Kongresa Fakto, kelkaj lokaj aktivuloj kaj la reprezentantino de la proponita kongresejo.



Esperanto-centroj:

Pluraj Esperanto-centroj vigle agadas, ekzemple la Kulturdomo de Esperanto, kastelo Greziljono, festis sian 70-jariĝon, Kvinpetalo daŭre funkcias malgraŭ la forpaso de Claude Nourmont, la Esperanto-urbo Herzberg (Germanio) regule invitas al siaj buntaj vesperoj, ktp... sed la rolo de UEA estas krei ligan

inter tiuj ĉi diversaj Esperanto-centroj, interalie per komuna retejo. Ni komencis reveni al tiu ĉi projekto, pri kiu jam estis unua rezulto antaŭ kelkaj jaroj, sed ni ankoraŭ ne atingis la deziratan celon. Nova estrarano pri Esperanto-centroj estas F. Lo Jacomo.



Ĝemelaj urboj:

La agado pri ĝemelaj urboj estas daŭre vigla, interalie en Italio – Torino havas 14 ĝemelajn urbojn. Marc Giraud (el Parizo) iĝis komisiito: kun Debora Rossetti (el Romo), li daŭre okazigas ĉiumonate retkunvenon kun ĉiumonate nova plia urbo en la mondo kaj diskuttemo. Ĉar laŭkontrakte Parizo estas la sola ĝemela urbo de Romo, kaj same Romo de Parizo, oni organizis vojaĝojn de esperantistaj parizanoj al Romo kaj reciproke. La nova estrarano pri ĝemelaj urboj, F. Lo Jacomo, filmis intervjuojn de pluraj aktivuloj en tiu kampo kaj prezentos la filmon dum la UK en Torino.



Landa agado:

Fine de 2022 la diversaj kontinentaj komisionoj de UEA renovigis sian konsiston. Pri la konsistoj kaj agadplanoj eblas legi en la marta 2023 numero de la revuo *Esperanto*. Dum la UK en Montrealo la Komitato aprobis novan Landan Asocion aliĝintan al UEA, nome la E-Asocion en Tanzanio. Kongresoj estas esenca parto de la kultura kaj movada agado en Esperantujo. Unuafoje prezidanto de UEA partoprenis BET, en Klaipėda (Litovio). Salutmesaĝojn D. Charters sendis al kongresoj kaj eventoj: i.a. Aŭstralia/Nov-Zelanda, Franca, Germana, Irana, BET, Israela, 3-a VK de UEA kun Retoso de TEJO, ILEI VEKI-3, 54-a Korea, 10-a Azia-Oceania, 8-a Afrika en Senegalo, Virtuala Poliglota Renkontiĝo, Vintraj Olimpikoj en Ĉinio. A. Wandel salutmesaĝis, respektive reprezentis UEA i.a. en Germana Kongreso, BET, Israela kongreso, Novjara Renkontiĝo kaj Luminesk'. F. Lo Jacomo kunreprezentis UEA en la Azia-Oceania kongreso en Busan kaj en la Afrika Kongreso apud Dakaro, helpante al venigo de la tuta Afrika Komisiono al tiu ĉi kongreso.

Afriko

En 2022, kadre de la programo Ni Semas, la Afrika Komisiono subvenciis per entuta sumo de 400 € 6 projektojn, en Burundo, Benino, DR Kongo, Madagaskaro. En decembro, okazis la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto en Sen-

egalo, kun partopreno de esperantistoj el 14 landoj, de 3 kontinentoj. La programo de la kongreso estis ege riĉa, kun interesa ekskurso. Ĉiuj membroj de AK partoprenis en la 8-a Afrika Kongreso kaj fizike kunsidis.

Ameriko

Dum la periodo la plej grava evento en Ameriko sendube estis la 107-a Universala Kongreso en Montrealo. Dum la UK kunvenis la Amerika Komisiono kaj plurfoje Esperanto-USA. Inter septembro kaj novembro okazis 3-a kurso por hispanparolantoj, partnere kun TEJO kaj Kolombia E-Ligo. Partoprenis 431 kursanoj, 342 en baza kaj 89 en meznivela kurso, per Discord kaj Google Meet. Pro la kurso UEA kaj TEJO gajnis preskaŭ 100 novajn membrojn. Ĉiuj el ili partoprenis la Virtualan Kongreson + Retoson. La kurso havis fortan valoron ne nur por varbado de membroj, sed ankaŭ por informado al centoj da homoj.

KAOEM

La 10-a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto okazis kun la temo "Novan Vojon por la Esperanto-Movado post Kronvira Krizo" en la junulara gastejo Arpina de Busan, Koreio (3-6.11.2022). Aliĝis 301 personoj el 33 landoj, 172 personoj fizike kaj 129 virtuale. La 40-a Komuna Seminario inter Ĉina, Japania, Korea kaj Vjetnama Junularoj okazis 28-29.12.2022 hibride, kelkaj reprezentantoj el Pekino ĉeeste kaj aliaj virtuale. Ĝi estis gastigita de Ĉina Junulara Esperanto-Asocio kaj Zaozhuang-a Universitato. Aliĝis al KS 120 personoj el 18 landoj. La Bulteno de KAOEM aperis 3-foje en 2022. Renovigitaj estas la komisionoj kaj estraranoj de KAOEM, kaj la retejo de KAOEM.

MONA

Ne okazis la MONA-kunveno dum la UK en Montrealo, ĉar neniuj el la 20 iranaj aliĝintoj sukcesis ricevi vizon. La respondeca estrarano A. Wandel prezentis MONA mallonge dum la inaŭguro. Egiptaj e-istoj kreis Telegram-grupon. Irana Esperanto-Asocio spertis grandan plialtigon en siaj agadoj post la komenco de la pandemio. Regule aperis la organo de IrEA, *Iranaj Esperantistoj* (kvar numeroj jare). Kunlabore kun universitatoj en diversaj urboj en Irano IrEA okazigis ret-seminariojn kaj retajn E-kursojn. Deko da studentoj pri turismo partoprenis en fizika E-kurso en la univ. de Teherano. La Irana E-kongreso en 2022 okazis virtuale. Esperanto-Ligo

en Israelo: Aperis rete kaj papere la bulteno *Israella E-isto* (2 jare). Unuafoje post la pandemio denove okazis fizike la Israella Kongreso (Jafo, oktobro 2022). Turkio: E-domo en Iznik estas preparita kaj akceptos gastojn en 2023.

Eŭropo

Dum la unua parto de la jaro 2022 la komisiono de UEA pri agado en Eŭropo kunlabore kun EEU kaj EDE multe laboris por havigi subtenojn al la propono por pli justa kaj pli efika Eŭropo (<https://mallonge.net/11c>) rilatanta al Esperanto en la Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo, lanĉita en la antaŭa jaro de la instancoj de EU mem. Kaj fakte ni sukcesis porti tiun proponon al la unua loko inter la proponoj en la kampo de edukado kun 16 000 subtenoj. Sed kiel ofte okazas en EU, la finaj rekomendoj ne prenis en konsideron la preferon de la civitanoj, sed insistis pri la ideoj pri lingvoj jam provitaj dum jardekoj kaj jam klare malsukcesintaj. Temas pri la jam ŝablona insistado pri plibonigo de la lingvo-kapabloj en la angla. Neniu ideo pri justeco kaj nediskriminacio de ĉiuj eŭropaj civitanoj ŝajnas esti parto de la reganta kolonia minuskomplekso de la gvidantoj de EU. Sekvis oficiala kaj neoficialaj protestoj. La resto de la jaro estis okupata pri reorganizigo por la postaj agadoj por Esperanto en Eŭropo. Estis planita inform-kampanjo tra Eŭropo pri Esperanto per la helpo de Guglo, kiu ekokazos en 2023, tuj kiam EEU rehavos siajn retajn pagojn. Komenciĝis ankaŭ provoj pri kunlaborado inter balkanaj eŭropaj landoj, el kiuj nur kelkaj havas stabilan kaj celkonscian agadon por Esperanto. La kunlaborado progresas kontentige kun retaj vidkunvenoj ĉiun monaton. En ĉi tiu kadro la greka movado komencis revigliĝi dum ankoraŭ hezitas la bosna movado. Akra dorno en la flanko de la Esperanto-movado eŭropa estas la malforto de la islanda kaj irlanda movadoj.

UEA estis aparte atenta pri la situacio de E-o kaj e-istoj pro la milito en Ukrainio, kaj aperigis du deklarojn kondamnante la militon kaj provante helpi al la rifuĝintoj: uea.org/gk/1026.

Scienca kaj faka agado:

La unua post-pandemia Internacia Kongresa Universitato (IKU) kaj la rilata Scienca Kafejo (SK) okazis plene hibride kadre de la UK en Montrealo. Entute okazis 7 IKU-prelegoj (el ili 3 IKU-AIS-kursoj) kaj 8 prelegoj de la Scienca

Kafejo. Ĉiuj prelegoj estis registritaj kaj sekve montritaj kadre de la Virtuala Kongreso en novembro. Ili ankaŭ estis alŝutitaj al la jutuba kanalo UEA viva. uea.org/teko/Scienca_kafejo/2022. A. Wandel proponis modifon de la IKU-regularo, tiel ke ankaŭ SK-prelegantoj ricevu honorarion, kaj IKU-AIS prelegantoj ricevu pli altan honorarion. Post la UK li organizis la dissendon de la IKU-libro al la prelegintoj kaj kunlaborintoj. Estis eldonita papere kaj virtuale la tradicia IKU-libro, kun ĉiuj tekstoj de la IKU-kaj SK-tekstoj. Aldone enestis la tekstoj de la 38-a Scienca Universitata Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), okazinta kadre de la 56-aj Baltiaj E-Tagoj en Litovio, 9-17 de julio. Redaktis Anna Striganova, Dima Ŝevĉenko kaj A. Wandel, eldonis Impeto: youtube.com/watch?v=Lva5_Rus5_Q. La IKU-libro 2022 aĉeteblas en la Libroservo de UEA: katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7447. Kadre de la 99-a Germana E-Kongreso okazis multaj prelegoj pri la kadra temo "Daŭripovo" subteno de la fonduso Erasmus+. Germana E-Asocio redaktis kaj eldonis 145-paĝan libron kun la tekstoj de 15 prelegoj: esperanto.de/de/node/2995. Regule ĉiumonate aperis la rubriko "Fake Science Profesie tra la mondo" en la revuo *Esperanto*, kun informoj pri Scienca kaj Faka agado en Esperantujo, samkiel pri sciencaj novaĵoj de la mondo.

Kultura agado:

Jarkomence UEA honoris la ĉeĥan poetinon Eli Urbanová, naskiĝintan 100 jarojn antaŭe. Nova verko aldoniĝis al la Serio Oriento-Okcidento, sub la n-ro 61: *La Horo 25*, tradukita de Ionel Oneț, eldonita de Mondial, havebla en la Libroservo de UEA. UEA aŭspiciis la 2-an eldonon de Interkultura Novelo-Konkurso (INK), kiu havis kiel honoran prezidanton la italan aŭtoron Paola Cereda. La rezultoj de INK-2 estos anoncitaj dum la UK en Torino. La novelaro de la 1-a INK, *Amo, tuso kaj forpaso: homoj kaj koviĝo*, estis eldonita de KAVA-PECH kaj aĉeteblas ankaŭ en la libroservo de UEA: katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=669. La ceremonio de la 73-aj Belartaj Konkursoj de UEA (BK) okazis dum la 107-a UK en Montrealo. Ĝin gvidis la vicprezidanto de UEA, F. Maia Jr., kun subteno de la eks-estrarano S. Spanò. Konceptis la ceremonion la sekretario kaj prezidanto de la BK, respektive Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Miguel Fernández. Premiitaj

en la 73-a eldono de la BK estis entute 173 verkaĵoj. Miguel Fernández legas la liston de premiitaj verkoj kaj aŭtoroj en 2022: youtu.be/sALpS16S-Ck. Disponebblas en la Libroservo de UEA la libro *Belarta rikolto 2022*, kun premiitaj verkoj de la 73-aj BK-j de UEA, eldonita de Mondial kunlabore kun UEA. En Montrealo dum la UK premieris la teatraĵo *1910*, filmita de Alekso Miller: 1910 – Originala Filmo en Esperanto de Ĵenja Amis (<https://youtu.be/fbWldQKlfrA>). La brita Esperantisto William Mann veturas tratempe al la jaro 2022 por rakonti al la kongresanoj en Montrealo pri sia propra sperto dum vojaĝo al Ameriko kun doktoro Zamenhof sur la transoceana ŝipego Georgo Vaŝingtono por la 6-a Internacia Kongreso de Esperanto antaŭ pli ol jarcento.

Kunordigo

Administrado:

Dungitoj de UEA en 2022 estis M. Schäfer (Ĝenerala Direktoro), R. Schmeits (Administra kaj Financa Fako) kaj I. Onet (Libroservo). Dum parto de la jaro krome laboris C. Magalhães (Kongresa Fako; ĝis 2022-07) kaj M. Martinez (Sekretaria Fako; de 2022-11). Entute temis pri 3,14 EPS (ekvivalentoj de plentempaj salajratoj). La laboron krome subtenis (kontraŭ modesta honorario aŭ volontule): (C. Baleyte; dungito de TEJO), R. Moerbeek (provlegado, Biblioteko), P. Zapelli (datumbazo, administra konsilado), A. Grigorjevskij (retejoj), A. Adĵevi (revuoj, diversaj), L. Obando (voĉlegado, UEAviva, financoj, diversaj) kaj Miguel Bento (administra subteno). La kongresan fakon nun ne plu prizorgas dungito de UEA.

Estraro:

La Estraro kun la Ĝenerala Direktoro kunsidis virtuale 24-foje dum la periodo, kutime ĉiun duan sabaton (dum 2-3 horoj) kaj unufoje ĉeeste, en Montrealo. Aldone pluraj estraranoj ofte kunsidis pri diversaj temoj. La komitato en Montrealo elektis novan Estraron. Nova divido de taskoj okazis.

Komitato:

Post la koronvira paŭzo, la komitato denove kunsidis ĉeeste. Dum la UK en Montrealo okazis 3 hibridaj kunsidoj (la komitatoj, kiuj ne povis viziti Montrealon, do povis partopreni rete). Nova konsisto de la komitato ekoficis en

Montrealo. Detaloj troviĝas en la retejo de UEA. Krome okazis reta kunsido por decidi pri la buĝeto (decembro 2022).

Revuoj:

Esperanto, inkluzive de la voĉlegitaj numeroj, aperis regule kaj akurate danke al diligenta laboro de Ŝevĉenko kaj Striganova kaj komisiito pri voĉlegado L. Obando. Pere de li UEA ankaŭ subtenis voĉlegadon de *Monato* por P. Peer-aerts kaj LIBE. Aperis nur kvar numeroj de *Kontakto* (bedaŭrinde kun granda malfruo). Nun redaktas P. Fischer-Kotowski. Informilo *EKO* (Esperiga Komunikilo): Stefan MacGill pretigis kaj sendis 72 numerojn dum 2022. La unuaj 25 leĝblas en *aktivulo.net*.

Reta agado:

UEA estas aŭspicianto kaj sponsoro de la fonduso Instigo-Liberapay. La fonduso subtenas E-agadojn, kiuj celas provizi retajn servojn en Esperanto, subgvido de Yves Nevelsteen, komisiito de UEA pri reta agado. Jen kelkaj el la agadoj subtenataj: Eventa Servo (eventaservo.org) estas moderna internacia kalendaro pri Esperanto-rilataj eventoj. Okaze de la Zamenhof-tago Eventa Servo organizis kampanjon, kun celo doni superrigardon pri la Zamenhof-festoj tutmonde. Komputeke (komputeke.net) estas prikomputila terminokolekto. Tradukado de Telegram (telegramo.org) kaj WordPress (eo.wordpress.com) al Esperanto; Wordpress estas uzata interalie de la retejo Libera Folio. Vikipedio, Vikidatumoj kaj aliaj vikimediaj retejoj (eo.wikipedia.org; wikidata.org) estas nemezureble gravaj por la teno de la memoro de Esperanto kaj ankaŭ por montri la diversecon de la uzo de nia lingvo. UEA kunlaboras ankaŭ kun la faka grupo ELiSo (Esperanto kaj Libera Scio, esperanto.wiki).

Financoj:

La spezokonto de UEA en 2022 denove havis ekvilibran rezulton. Estis diversaj eksterordinaraj enspezoj (VK, ŝtata subvencio), sed ankaŭ estis eksterordinaraj elspezoj (salajro-kostoj). Denove ni spertis grandan donacemon (ĉefe Societo Zamenhof kaj Alianco 365) deflanke de niaj membroj. Inter la donacoj troviĝas pli ol 18 000 EUR da donacitaj UK-kotizoj (UK-nuligo pro Kovimo). En la

bilanco troviĝas bona sumo da rezervejoj (por eventualaj pluvaj tagoj de la asocio). La financaj merkatoj estis komplikaj. Pro tio UEA en 2022 spertis reduktion de la Ĝenerala Kapitalo.

Transdono de la Arkivo de UEA al la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko:

En la unua semestro de 2022 la Arkivo de UEA kaj neduoblaĵoj de la Biblioteko Hector Hodler, kiuj troviĝis en la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo, estis transdonitaj al la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB) en Vieno. La transdono okazis surbaze de donackontrakto, kiu certigas la konservadon de la donitaĵoj fare de ANB **por ĉiam** kaj laŭ la internaciaj normoj adoptitaj por la administrado de palpeblaj moveblaj kulturaj heredaĵoj, kiel estis identigitaj la arkivo kaj ĉiuj donacitaj materialoj fare de UEA. La dua etapo de la laboro estas la finkatalogado kaj disponigo, inkluzive de ciferecaj kopioj, al la interesata publiko. Unuaj dokumentoj jam estas katalogitaj kaj ciferecigitaj.

Strategia Laborplanado:

2022 anonciĝis kiel “Jaro de strategia planado” en la novjara mesaĝo de la Prezidanto, kaj dum la jaro okazis multaj interŝanĝoj kaj intervenoj pri aspektoj de la temo, kaj rekte kun la Prezidanto kaj sendepende kun raportado kaj rekomendoj de diskutgrupoj kaj individuoj. Dum la UK en Montrealo la Komitatitaj forumoj fokusiĝis pri la temo, la Estraro havis la temon en la tagordo de ĉiu kunsido, kaj rezulte reorientiĝis la diskuto al pli klaraj kaj konkretaj celoj por fintrakto kaj realigo en 2023.

Membraro:

En 2022 UEA havis 4 552 individuajn membrojn (IM), pli ol en 2021 (4424, +128). Tiuj IM-oj reprezentas 126 landojn aŭ teritoriojn: plej multe Germanion (395), Francion (337), Brazilon (290), Usonon (277) kaj Japanion (222). Daŭra problemo estas la falo de la abonanoj de la papera versio de *Esperanto* (entute -78 kompare kun 2021). Daŭre estas tendeco legi materialon nur rete. Iom malkreskis la kvanto de aligitaj membroj (AM): 8 509 (8 522 en 2021, -13), el kiuj 1 226 (1 224 en 2021, +2) estas junaj AM-oj (TEJO). Tiel la tuta membraro (IM+AM) de UEA en 2022 estis 13 063 personoj.

Spezokonto

de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 2022 (ĉiuj sumoj estas en eŭroj)

KOSTOJ

rezulto 2021		buĝeto 2022	rezulto 2022	rezulto 2021		buĝeto 2022	rezulto 2022
10489,74	Salajroj	110000	145037,49	12893,31	Preskostoj	13000	15302,59
6166,72	Eksteraj laborfortoj	12000	5432,50	12519,15	Redakto, grafiko ktp	13000	12534,37
24213,76	Sociaj asekuroj	23000	24709,22	17079,46	Dissendo/kovertoj	18000	16927,65
2164,01	Suplementoj	3000	4084,88	-2205,00	Anoncoj	-600	-1405,00
107,60	Kafo, teo, lakto	120	55,28	40286,92	Revuo Esperanto, nete	43400	43359,61
-1571,60	Malsankompenso	0	0,00	3646,94	Preskostoj <i>Kontakto</i>	3500	4202,12
-47853,00	Ŝtata Subvencio	0	-10865,00	1867,16	Dissendo/kovertoj	2000	1670,13
19500,00	al rezervo "oficistaro"	0	0,00	1200,00	Grafiko	1200	1175,00
107623,23	Salajroj ktp, nete	148120	168454,37	2820,00	Redakto	2820	2585,00
912,17	Afranko nete	1500	1201,64	0,00	minus Anoncoj	-20	0,00
1163,15	Telekomunikiloj	1000	1287,14	9534,10	Revuo Kontakto, nete	9500	9632,25
302,87	Presajoj	500	533,66	0,00	Estraro (vojaĝado)	4000	3930,68
1086,90	Materialoj	900	747,54	510,57	Estraro / Komitato (korespondo)	500	109,38
2040,45	Maŝinoj, riparoj/prizorgo	1800	2010,09	7240,60	Oficaj kostoj	8000	8277,55
0,00	Revizorado	1000	0,00	0,00	Vojaĝado (UK)	2500	11102,72
4035,45	Administrataj/juraj kostoj	3500	3430,61	7751,17	Vojaĝkostoj/ korespondado	15000	23420,33
664,81	Kopiado	800	849,47	3554,26	Kunordigo (Reteja prizorgado)	3240	3485,91
-7,50	Kopiado (vendoj)	-100	-101,94	3554,26	Movada evoluigo	3240	3485,91
10198,30	Centra oficejo, nete	10900	9958,21	2140,08	Bankokostoj	2400	2132,67
6576,08	Gaso, elektro	6000	7488,35	-240,32	Kurzdiferencoj	0	-382,50
441,81	Akvo	450	281,70	165,50	Reprezentado	1500	1554,20
681,22	Riparo de la Domo	1000	1429,68	967,53	Antaŭaj jaroj	1000	442,47
873,69	Purigado	700	835,70	-3,33	Diversaj kostoj	0	-1,74
4500,68	Asekuroj	4000	4623,64	3029,46	Ĝeneralaj kostoj	4900	3745,10
0,00	Fajroprotektita Sistemo	0	0,00	1391,08	Amortizo, aparatoj/mebloj	2000	1301,43
4692,56	Impostoj je la Domo	4500	74,11	692,97	Amortizo, komputiloj	350	500,87
0,00	Luo ricevita	0	-200,00	517,03	Amortizo, programaro	600	300,37
17766,04	Oficeja Domo, nete	16650	14533,18	2601,08	Amortizoj entute	2950	2102,67
3380,00	Aliaj oficejoj (oficistaro)	3120	3360,00	209024,98	SUMO de la KOSTOJ	271280	283931,41
3300,42	Aliaj kostoj	13500	1879,78				
0,00	Enspezoj	0	0,00				
6680,42	Aliaj oficejoj (entute)	16620	5239,78				

RIMEDOJ

rezulto 2021		buĝeto 2022	rezulto 2022	rezulto 2021		buĝeto 2022	rezulto 2022
48,37	Membroj Gvidlibro	0	48,37	48320,22	Vendoj de Libroservo	54000	44285,96
42883,95	Membroj bazaj (MB)	35000	41644,19	-32983,84	Kostoj de varoj venditaj	-39000	-34042,47
3809,00	Dumvivaj Membroj (DMB-baza)	3000	4043,00	15336,38	<i>Libroservo malnete</i>	15000	10243,49
53931,23	Membroj-Abonantoj (MA)	49000	49840,82	0,00	Merkatado	-200	0,00
23584,00	Dumvivaj Membroj (DMA)	23700	23088,00	-1202,34	Kreditkartaj kostoj	-400	-944,74
9039,07	MB TEJO	5500	8998,48	14134,04	Libroservo, nete	14400	9298,75
5049,43	MA TEJO	2500	3655,25	5405,10	Vendoj de la Eldona fako	3000	4067,02
138345,05	Kotizoj individuaj membroj	118700	131318,11	0,00	Aldonoj (novaj libroj)	0	0,00
-22135,21	al rezervo Fondaĵoj (16%)	-18992	-21010,90	-1710,86	Ŝanĝo stokvaloro	-1500	0,00
116209,84	Kotizoj IM nete	99708	110307,21	-66,13	Tantiemoj	-100	-97,81
8520,10	Aligitaj membroj	8000	8526,61	3628,11	Eldona fako, nete	1400	3969,21
1180,10	Aligitaj membroj junaj	1000	1191,40	11765,00	Luo Volontula Domo	11000	13200,00
1638,62	Abonoj Esperanto	1500	1288,83	-1832,54	Gaso, elektro, akvo	-1600	-1649,29
0,00	Kolektivaj abonoj Esperanto	0	0,00	-347,80	Riparoj	-500	-685,17
3704,73	Abonoj Kontakto	3500	4457,17	-82,28	Asekuroj	-500	-82,28
150,00	Kolektivaj abonoj Kontakto	100	150,00	-408,13	Amortizo	-600	-326,50
14383,48	Societo Zamenhof	13000	12520,38	-1204,68	Asocio komunaj posedantoj	-1200	-1256,40
1936,00	Fakaj Organizoj	1732	1936,00	-514,78	Impostoj	-750	-517,91
-3354,76	pago al TEJO	-2200	-3210,85	-777,72	Ceteraj kostoj	-750	-778,12
144368,11	Kotizoj entute	126340	137166,75	6597,07	Volontula Domo entute	5100	7904,33

rezulto 2021		buĝeto 2022	rezulto 2022
0,00	Grafikaj servoj	0	0,00
5400,66	Servoj aliaj	3000	9461,52
0,00	Programado	0	0,00
1000,00	Instituto Hodler	1000	1000,00
14568,08	20%a: laŭ kalkulo	8000	9341,56
-14500,00	20%a: al rezervo, aliaj rezervoj	0	0,00
6468,74	Servoj kaj kompensoj	12000	19803,08

rezulto 2021		buĝeto 2022	rezulto 2022
0,00	Kotizoprocentaĵo UK, VK	37000	44008,92
10093,49	Rento nete	15280	15501,87
17055,01	Donacoj	10000	39607,81
3685,27	Antaŭaj jaroj	500	2429,05
3232,50	Aliaj	0	4875,68
34066,27	Diversaj enspezoj entute	62780	106423,33

209262,34	SUMO de la RIMEDOJ	222020	284565,45
-237,36	Saldo	49260	-634,04
209024,98	SUMO de la KOSTOJ	271280	283931,41

Bilancio

je la 31-a de decembro 2022

(ĉiuj sumoj estas en eŭroj)

Aktivoj

	2021	2022
Domo Rotterdam	138304,91	138304,91
Renovigo Domo Rotterdam	268212,90	268212,90
Garaĝo	22007,71	22007,71
Volontula Domo	222557,53	222557,53
Apartamento Montpellier	35000,00	35000,00
Tereno Aspremont	1,00	1,00
Nemoveblaĵoj	686084,05	686084,05
Aparatoj kaj mebloj	8215,99	6621,97
Komputilaro	1588,64	1087,77
Programaro	801,02	500,65
Volontula Domo. Aparatoj, mebloj	1632,52	1306,02
Maŝinoj kaj mebloj	12238,17	9516,41
Blokitaĵoj monrimedoj	0,00	0,00
Akcioj k.s.	1183594,55	1172556,81
Obligacioj	282766,72	229750,34
Valorpaperoj entute	1466361,27	1402307,15

	2021	2022
Stoko Libroservo	214718,13	218089,45
Stoko eldona fako	78922,71	77033,23
Stokrezervo	112,03	112,03
Presajoj, materialoj ktp.	4391,40	3402,41
Provizioj entute	298144,27	298637,12
Ricevotaj rimedoj	4712,07	35317,77
Antaŭpagitaj kostoj	11708,58	11988,86
Debitoroj	43326,66	42228,77
Debitoroj k.t.p.	59747,31	89535,40
Ŝparkontoj kaj deponoj	2268297,20	2265116,43
Kurantaj bankkontoj	684651,61	743269,97
Kasoj diversaj	515,01	1366,52
Kasoj / bankkontoj entute	2953463,82	3009752,92
Aktivoj, sume	5476038,89	5495833,05

Pasivoj

	2021	2022
Ĝenerala Kapitalo	1584798,62	1493208,59
Saldo spezoj	237,36	634,04
Kapitalo Azio	409956,88	393433,41
Kapitalo Afriko	96652,20	96652,20
Kapitalo Eŭropo	9387,97	9387,97
Kapitalo Edukado	1500,00	1500,00
Kapitalo Informado/Harry	15008,13	15008,13
Kapitaloj entute	2117541,16	2009824,34
Kapitalo Dumvivaj Membroj	313012,91	278352,97
Rezervo debitoroj	16432,59	16432,59
Kongresa Rezerva Fondaĵo	67248,28	66992,55
Rezervo UK-licencpagoj	12,38	12,38
Rezerva Fondaĵo IJK	0,00	0,00
Rezervo (socia)	25827,39	21272,74
Rezervo 20%a regulo	30000,00	30000,00
Rezervoj premiaj	5111,10	4111,41
Rezervoj Kapitalo (dumvivaj MB)	110904,68	120810,21
Rezervoj dumvivaj, dpt, dsz	1641,03	2381,03
Rezervo Reteja Renovigo	27838,22	26277,00
Donacoj Volontula Domo	348,40	408,64
Rezervo Oficistaro	54500,00	54500,00
Rezervo Fondaĵoj	29954,97	34965,87
Rezervo Huttunen	99608,13	99608,13
Aliaj sumoj rezervitaj	110070,10	174615,16
Rezervoj entute	892510,18	930740,68
Fondaĵo Ameriko	24651,77	20407,53
Belarta Fondaĵo	59917,48	55465,76
Fondaĵo Biblioteko	23188,78	16629,63
Fondaĵo Biblioteka Apogo	4822,56	4822,56

	2021	2022
Fondaĵo Canuto	23469,32	18627,09
Fondaĵo Eksteraj Rilatoj	14368,08	322,75
Fondaĵo Grabowski	24413,89	26435,05
Fondaĵo Junularo	10000,00	10000,00
Fondaĵo Informado (Harry)	16050,25	16000,66
Fondaĵo Klerigo / Kapabligo	3230,80	4040,80
Fondaĵo Kultura Evoluigo	1397,62	1437,04
Fondaĵo Middelkoop	84221,06	75893,66
Fondaĵo Mona	645,36	645,36
Fondaĵo Partoprenu UK	28886,53	24064,79
Volontula Fondaĵo	37929,94	32493,58
Konto Afriko	24856,74	23266,14
Konto Azio	16800,09	19230,79
Konto Edukado/Wüster	758,04	992,49
Konto Espero	29761,62	39240,44
Konto Eŭropo	1603,48	1555,38
Klimato/CO2	-	1320,30
Konto Reklamado EU	6359,71	6359,71
Propaganda Konto	60085,85	57985,85
Fondaĵoj entute	497418,97	457237,36
Antaŭricevitaj rimedoj	38143,80	31454,97
Antaŭric. rim. Torino 2023	-	69261,84
Saldo Montrealo 2022	-	106164,88
Pagotaj kostoj	20313,95	41994,64
Pendantaj spezoj	11106,78	2108,19
Pendantaj heredaĵoj	0,00	0,00
Kreditoroj kaj kreditaj saldoj	1213986,43	1241828,53
Ŝpardeponoj de membroj	685017,62	626217,62
Kreditoroj k.s. entute	1968568,58	2119030,67
Pasivoj, sume	5476038,89	5516833,05

Scienca agado en la Germanaj E-Kongresoj kaj la 50-a BEL-a jubileo

Aperis libroforma GEA-kongresa dokumento pri daŭripovo subvenciita de Erasmus+

■ Amri Wandel

Krom la IKU-libro maloftas sciencaj eldonaĵoj en Esperanto. Tial des pli valoras la impona libro *Daŭripovo – Germana E-Kongreso Oldenburg 2022*, eldonita de GEA kiel raporto al la Fonduso Erasmus+, kiu subtenis la traktadon de tiu temo en la pasintjara Germana Kongreso. La libro, redaktita de Franz Kruze, ampleksas 145 paĝojn, kaj enhavas 15 tekstojn de la prelegoj okazintaj dum la kongreso. La ĉeftemo daŭripovo estas konsiderata de variaj aspektoj: lingvo (D. Charters), lingvopolitiko (F. Gobbo), biodiverseco (B. de Wit), akvomastrumado (I. de Bruin-Kooij), bitmono (M. van Hulten), fervojo (G. Brandenburg), marĉoj (M. Westermayer), ekonomio (J. Neumair), spac-ekspluatado (A. Wandel), malavantaĝoj de daŭripovo (A.F. de Geus), Orientfrisaj insuloj (H. Klünder), EU-subvencioj (Y. Nevelsteen), handikapo (W. Groen) kaj persona plenumo (J. Wulff). La libro estas disponebla en <https://mallonge.net/10m> en tri versioj: presita libro, bitlibro, senpaga PDF en alta kaj malalta kvalitoj por elŭti.

Sciencaj prelegoj dum GEK-100

Ankaŭ en la jubilea 100-a Germana E-Kongreso okazis sciencaj prelegoj – Ilona Koutny rakontis pri Interkultura Komunikado en Esperanto kaj Amri Wandel pri la Serĉo de Vivo Ekstertera.

Koutny prezentis larĝan aliron al kulturo de eksteraj ĝis internaj elementoj, de simboloj kaj kutimoj tra artoj

kaj iliaj perantoj ĝis la pensmaniero. Ŝi difinis faktorojn de interkultura komunikado kaj de interkultura kompetento, fokusiĝis al la lingva flanko, kiu povas kontribui al la (ne)sukcesa komunikado, kaj la kulturajn diferencojn, kiuj karakterizas ankaŭ Esperanton kaj povas kaŭzi problemojn. Ŝin akompanis ŝiaj ĉinaj studentoj en la Esperanto-programo en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano.

Daŭripovo



Kongresa Dokumento
Tagungsband · Congresbijdragen

Wandel traktis la temon el tri vidpunktoj: biokemiaj vivsignoj en ekster-planedoj de foraj sunsistemoj, serĉo de eksterteraj objektoj kiel Oumuamua, NIFOj kaj la Fermi-Paradokso (vidu *Esperanto* 2023: 3 p. 66). Lian kurson akompanis la noveldonita broŝuro pri eksterplanedoj, NIFOj kaj SETI (vidu *Esperanto* 23:6 p.143). Kadre de la kurso ekzameniĝis ok personoj, kiuj perrete ricevis AIS-atestojn. Fine de la kongreso Wandel estis intervjuita kiel astrofizikisto kaj vicprezidanto de UEA de la loka radio Oker: <https://mallonge.net/10n>.

50-jara jubileo de Bahaa E-Ligo

■ Bernhard Westerhoff,
sekretario de BEL

Lige kun la ĉi-jara 50-jariĝo de sia fondo Bahaa Esperanto-Ligo (BEL) lastatempe povis realigi kelkajn projektojn. Tiel aperis bele ilustrita 20-paĝa broŝuro pri la disvolviĝo de BEL kaj la rilatoj de la Bahaa Kredo al Esperanto. Ĝi estas dulingva – angla/Esperanto; pretas ankaŭ hispana traduko – ĉar ĝi prioritare celas informi la bahaanojn kaj estas dissendita al kvindek da bahaaj landaj kaj internaciaj gvidorganoj. Ĝia enhavo alireblas ankaŭ – denove trilingve – en la retejo de BEL <https://bel.bahai.de>. Tie troviĝas ankaŭ aro da lastatempaj gazetaraj komunikoj pri diversaj BEL-aj kaj ĝenerale bahaaj evoluoj. Krome ĵus eldoniĝis en Esperanto-traduko la grava verko *Dio preterpasas* de Shoghi Effendi (origina angla titolo: „God passes by“), kiu donas fundan superrigardon pri la elstaraj eventoj de la unuaj cent jaroj, 1844 ĝis 1944, de la Bahaa Revelacio. La verko elstaras en la historio de la religioj, ĉar pere de tiu ĉi libro unuafoje eblas de tre proksime kaj relative tre baldaŭ post la okazintaĵoj observi la naskiĝon de nova religio kaj kiel ĝi faras siajn unuajn paŝojn. La preskaŭ 500-paĝa tole bindita libro jam mendeblas ĉe BEL kaj tra kelkaj Esperanto-libroservoj. La libro estas ankaŭ alirebla kiel PDF pere de <https://bel.bahai.de/literaturo/>.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Inter kubaj montetoj kaj valoj: Krisolaj Esperanto-Tagoj 2023

■ Ariadna García Gutiérrez

La Esperanto-filio de KEA en la orienta provinco Granma okazigis sian regionan eventon “Krisolaj Esperanto-Tagoj” ĉe la kampara feriejo “La Monteto” de la 18-a ĝis la 22-a de majo.

Ĝi estas la unua en la postpandemia tempo kaj kunvenigis 12 esperantistojn el la orientaj provincoj Santiago de Kubo, Guantánamo kaj Granma, kiuj kune ĝuis diversajn distrajn aranĝojn, paroligan kurson de Esperanto, didaktikajn ludojn, kulturajn vesperojn kaj ekskursojn tra historiaj lokoj de la regiono, situanta inter montetoj kaj valoj.

Estis bona okazo por interŝanĝi kun loĝantoj de la komunumo de “La Monteto” dum vizitoj al interesaj lokoj, interalie, kafoplantejoj. Tiu ĉi neformala interŝanĝo rolis kiel informa spaco por paroli pri Esperanto al la loĝantoj de tiu bela regiono for de la urbo.

La Krisolaj Esperanto-Tagoj (KET), aludas al prestiĝa kultura evento de la regiono Krisolo de Nacieco, kiu ĉiujare efektiviĝas en la provinco, lulilo de la kuba nacieco.



Tiamaniere, KET estiĝis antaŭ kelkaj jaroj kiel plia alternativo por kunvoki la esperantistaron kaj kundividi spertojn pri la Esperanta agado ĉefe de la filioj kaj municipaj grupoj de tiu orienta landoparto, kio kontribuas sendube al senhalta aktivado kaj utiligo de Esperanto por kulturkleriga evento.

Afriko brilas

Brilanta Esperanta Afriko

■ La Redakcio

Jam 70 numerojn seninterrompe en la revuo *Esperanto* aperas la rubriko “Afriko brilas”. Ĝi estis lanĉita en 2017 laŭ la iniciato de Mireille Grosjean. La rubriko riĉigis nian informan kampon per pluraj informoj de la kontinento, rilataj al uzo kaj disvastiĝo de nia internacia lingvo.

Afrika Esperanto-movado estas tre aktiva. I.a. por la 109-a Universala Kongreso, kiu okazos en 2024, estis elektita urbo Aruŝa en Tanzanio, kiu estos la unua UK en tiu ĉi kontinento.

Por informiĝi pri pluraj aktualaj temoj, rilataj al Afriko kaj Esperanto, ni rekomendas, se vi ankoraŭ ne faris tion, abonon Guglo-grupon: afriko@googlegroups.com. Dum la lastaj tagoj tie aperis multaj interesaj informoj, kiel ekzemple “Orienta Afrika seminario de Esperanto”, detala raporto pri la agado de Tutafrika Kongresa Komitato, novaj jutubaj filmetoj en Esperanto kaj multo alia.

Ni ankaŭ invitas vin viziti la retpaĝon de Afrika Komisiono de UEA – <https://www.esperanto-afriko.org/>.

Kaj, kompreneble, se vi estas esperantisto el Afriko aŭ/ kaj aktive partoprenas ties movadon, ni bonvenigas sendi al la redakcia retpoŝtadreso viajn kontribuproponojn por la rubriko “Afriko brilas”.

Kie estas la sekva plej bona novelo?



Torino, Italio Università di Torino, Centro Aldo Moro 28-29/07/2023

75-a Datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj: kiu estas la stato de efektivigo de lingvaj rajtoj?

Aliĝo estas senpaga:
<https://interlingvistiko.net/lingvopolitiko/nitobe-simpozio-2023>

Organizantoj :
Michele Gazzola, Nicole Marinaro, Maria Margherita Mattioda, Marie-Berthe Vittoz

Scienca komitato:
Michele Gazzola, Nicole Marinaro, Maria Margherita Mattioda, Guilherme Fians, Snehaja Venkatesh, Mark Fettes, Klaus Schubert, Marie-Berthe Vittoz

Por informoj:
Marinaro-N@ulster.ac.uk

Alianco 365 estas plano por monata konstanta donacado al UEA. La celo de la plano estas garantii al nia Asocio financan ekvilibron, kontribuante por pozitiva jara rezulto, kio signifas daŭripove ebligi al UEA plenumi sian mision. Laŭ tiu plano donacantoj pretas donaci po 31 EUR monate al la Asocio, kio egalas donaci po nur 1 EUR tage. Alternative donacantoj povas fari unufojan donacon de 365 EUR por la kuranta jaro.

Kiel donaci?

Per banko:

UEA-konto en ING Bank,
Postbus 1800,
NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A)

Per Paypal: vidu detalajn instrukciojn ĉe la Reta Revuo –

https://revuoesperanto.org/alianco_365.